



1*88.124.

STARTO

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



mesaĝo

de la prezidanto de ĈEA



Karaj legantoj,

ne estas facile por mi kiel nova prezidanto de ĈEA skribi la novjaran mesaĝon al vi malpli ol tri monatojn post nia olomouca kongreso, sciante, ke vi ricevos ĝin ne pli frue ol post pluaj tri monatoj. Sed pro teknikaj kialoj alia vojo ĝis nun ne eblas.

Tamen mi strebos sciigi vin almenaŭ koncize pri la planoj, kiujn mi, kun miaj plej proksimaj kunlaborantoj en la prezidantaro, havas startante en la novan jaron kaj samtempe en la duan jarcenton de la lingvo esperanto.

Multaj kritikoj estis eldiritaj al la agado de nia Asocio dum la lastaj jaroj kaj mi opinias, ke multaj el ili estis vere pravaj. Sed ne pravas tiuj, kiuj diras, ke nenio pozitiva estas farita. La raportoj kaj diskuto dum la 5-a kongreso de ĈEA klare montris altan nivelon de agado de multaj niaj fakaj sekcioj, lokaj grupoj kaj individuaj esperantistoj...

Kaj ni, anoj de ĈEA, esperu kaj faru ĉion eblan, por ke komence de la dua jarcento ni kontinuu en la sukcesoj akiritaj, evoluigu ilin plu kaj forigu la mankojn faritajn en nia agado ĝisnuna.

El niaj planoj mi nomu almenaŭ kelkajn: rilate al nia anaro ni emas plibonigi la reciprokan informadon. Tio postulos interalie iomete ŝanĝi la asocian strukturon. Plue, ni nepre devas akiri novajn, pli grandajn, asociajn ĉambrojn, ne nur por havi pli bonan oficejon, sed ankaŭ por povi ekfunkciigi bibliotekon kaj legejon, plue instali tranoktejon en Prago. Tio tamen estus nur bazo por pli riĉa agado en la faka kaj belarta aktivadoj, por pliriĉigo de turismo kaj evoluo de efika vojo de informado al neesperantistoj, kun la celo plivastigi ne nur la scion pri esperanto, sed ankaŭ plinombrigi niajn vicojn.

Krome, ni ne rajtas forgesi nian riĉan historion. Kiel nian moralan devon ni sentu ekzemple restarigon de la impona unua monumento en la mondo, starigita honore al D-ro L.L.Zamenhof en Františkovy Lázně la 1-an de junio 1914, kiun poste tute detruis nazioj.

Kaj, finfine, mi menciuj nian ĉefcelon por la nun iranta periodo - aranĝon de Universala Kongreso de Esperanto en Prago, kiun ni planas aranĝi en la jaro 1992.

Fine de mia novjara mesaĝo mi deziras al vi, karaj legantoj de nia asocia bulteno, multajn sukcesojn kaj en via privata vivo, kaj en via poresperanta kaj porpaca agado.

Samideane,

Via

Ing. Petr Chrdle
prezidanto de ĈEA

En Ĉernošice la 1-an de decembro 1987

Pensoj en la Jubilea Jaro

La politikistoj pretas ĉiunomente diri belajn vortojn pri kio ajn. Ankaŭ pri Esperanto.

En la unua jarcento la esperantistoj devis "esperi", en la dua ili devos "kredi".

La adeptoj de kiu ajn ideo, movado sen taŭgaj gvidantoj estas sencelle vaganta ŝafaro.

Ĉiu asocio, societo, klubo postulas ion de siaj anoj: scion, ian laboron, partoprenon en la agado kaj kotizon. Kaj en nia movado? Praktike sufiĉas nur kotizpago por ne perdi la membrecon. La entuziasmo ofte ĉion substituas.

Flanke de la neesperantistoj ne tio gravas, kion ili diras pri Esperanto, sed kion ili faras por Esperanto.

Estas diroj, pensoj de niaj famuloj, kiujn ĉiuj esperantistoj devus koni. Jen tiu de F.Jonas, iama prezidanto de Aŭstrio: "Se la Esperanto-movado estos forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon."

Trafa diro, akceptinda konsilo de Zamenhof, per hazardo trovita en PIV. "Neniu registaro venos al ni, se ni mem ne impresos per nia forto".

La konkurantoj de Esperanto estas ne la naciaj lingvoj -, pri kio ili tute ne scias -, sed la artefaritaj lingvoj, lingvoprojektoj, sed ilin Esperanto jam venkis.

"Aparte kaj kune", jen la eblaj vojoj al la oficialigo de Esperanto: disvastigi Esperanton "naciskale", en ĉiu lando memstare, sed kunlabori sur ĉiuj terenoj "internaciskale", kie montriĝas la plej eta eblaĵo.

Grava konsilo: Esperanton kaj la movadon neniam juĝu laŭ kelkaj adeptoj de la lingvo; ja, kiu ajn povas diri: ankaŭ mi estas esperantisto.

Por interparoladi, konversacii, legadi vere sufiĉas la lingvoscio - gramatiko kaj certa vortprovizo -, sed senti la belecon, esencon de Esperanto, al tio jam necesas koni la paseon, prezenton de la lingvo por kredi ĝian futuron.

Venki la indiferentecon de la mondo! - diris Zamenhof. Venki la indiferentecon de la amaskomunikiloj - gazetaro-radio-televido - signifas la venkon de la mondo.

La neesperantistoj nur tion scias pri Esperanto, kion ili aŭdas, legas pri ĝi nacilingve. Kaj sian gepatran lingvon ĉiu esperantisto bone scias, parolas.

Ofta demando al esperantistoj: Ĉu en Esperanto eblas paroli, kompreni sin reciproke aŭ nur legi? Tiam mi respondas: Jenaj radiostacioj... disaŭdigas en Esperanto ĉiutage kvin-sesfoje duonhoron aŭ ĉiusemajne plurfoje. Ĉu vi supozas, ke la kompetentuloj - ĉu registaroj ĉu radiodirektoraro - estas tiel stultaj, ke ili elsendas en lingvo, kiun neniu parolas kaj neniu komprenas? Kaj tio eĉ kostas monon por ili!

En kelkaj revuoj la kulturo, do nia literaturo, estas la librorecenzoj.

La esperantistoj scias, kion ili volas; la problemo estas la Kiel?

D-ro I. Nagy

NI PREZENTAS LA NOVAN ESTRARON de ĈEA



Ing. P. Chrdle
prezidanto



Ing. V. Kočvara
1-a vicprezid.



V. Podhradská
2-a vicprezid.



K. Franc
sekretario



Doc. RNDr. V.
Novobilský CSc.



J. Patera



Ing. M. Turková

PLUAJ MEMBROJ de CK



PhDr.
V. Barandovská



K. Janík



D. Kočvara



M. Malovec



Jos. Novák



Ing. Z. Pluhar



P. Sittauer



MUDr. V. Škoda



H. Štruncová



PhDr.
M. Vančurová



J. Vondráková



J. Kašparec



O. Klima



Ing. Jos. Krob



Ing. R. Surý



J. Vychodil



MEMBROJ de CKRK



PhDr. J. Šnapka



Ing. J. Hudera



O. Barešová



Z. Heiser



B. Hodovský



J. Řepa



R. Vlčková



Ing. S. Křeš



J. Smejkal

K. Gleisner, Ml. Boleslav
L. Kazdová, Miletín
J. Steklý, Nestěmice
M. Hanusová, Brno
Ing. O. Tuháček, Olomouc
Z. Lantová, Hrabyně
J. Liták, Teplice
M. Kašický, Středová
J. Kukla, Praha 4
Dr. Z. Minich, Nestěmice
V. Echtner, Domažlice
V. Pospíšilová, Medlešice
MS Mnichovo Hradiště
J. Pils, Praha 4
F. Putala, Brankovice
V. Foubík, Miletín
MUDr. V. Šimeček, Praha 6
J. Kadlec, Nové Město n. M.
D. Průšová, Říčany
J. Sabatová, Kladno
Z. Maroušková, Č. Budějovice
K. Gleisner, Ml. Boleslav
K. Zápser, Český Těšín
J. Novák, Brno
S. Šírová, Turnov
Ing. F. Sedlář, Lípov
F. Štoviček, Hradec Králové
M. Juřenová, Újezd n. Lesy
D. Matoušová, Studánka
T. Folta, Stará Bělá
Ing. M. Slechtová, Jaroměř
M. Werl, Třebíč
M. Pastrňák, Havířov-Suchá
F. Janouš, Rumburk
Ing. Z. Veselý, Nymburk
F. Müller, Brno
J. Bílek, Chomice
Dr. S. Weisová, Praha 1
H. Příhodová, Kostelec
M. Mlýnková, Gottwaldov
A. Miklasová, Praha 4
J. Lešinger, Česká Třebová
V. Špaček, Kraslice
A. Krameničová, Praha
M. Beranová, Volary
J. Volf, Praha 9
J. Hofman, Plzeň
J. Vypová, Praha 6
J. Faimanová, Praha

Ing. R. Surý, Ostrava
A. Lanterbach, Chlumec n. C.
H. Klusáková, Svitavy
O. Müllerová, Šumperk
Ž. Šandová, Hrabyně
H. Divilková, Hrabyně
J. Jungová, Pardubice
J. Špür, Vidon
A. Šmídová, Městečko Trnávka
H. Kovačiková, Vyškov
F. Štávoval, Velké Losiny
J. Pastrňáková, Ostrava
J. + M. Volných, Frýdek-Místek
J. Středová, Broumov
MUDr. V. Nekuda, Brankovice
M. Trkalová, Mirová
J. Harcuba, Praha 6
V. Zatloukal, Kolín
M. Štánková, Brno
V. Částek, Proseč
F. Stranák, Paskov
L. Kazdová, Mělník
B. Pivonka, Praha 4
A. Hoffmannová, Praha 6
M. Krsová, Rokycany
M. Kučerová, Brno
J. Pytlík, Bystřice u Benešova
F. Szappancsik, Velké Svatoňovice
L. Komzáková, Tábor
MUDr. V. Tobiášová, Chotěboř
Ing. I. Riegrová, Ostrava
J. Szemek, Hrádek
M. Čekal, Děčín 5
S. Šimová, Žlutice
Z. Malinková, Břeclav
F. Kovařínský, Chomutov 1
B. Dzida, Havířov
J. Dvořák, Praha 1
V. Šebková, Přeštice
E. Baďurová, Karviná-Fryštát
M. Kulová, Olomouc
L. Prokopová, Mnichovo Hradiště
MS Hradec Králové
J. Plančík, Chcebuž
ESLI Fiala, Poděbrady
A. Wagner, Poděbrady
V. Němec, Blansko
J. Kopa, Dubicko

lingva angulo

Bernard Golden

Akoraŭ unu transbapto de gento:
la kolombianoj fariĝas kolumboj!

1. Kolumbio aŭ Kolombio?

Se vi opinias, ke vi bone scias Esperanton, trovu la erarojn en la sekvaj citaĵoj.

- En la pacagado ni, sincerkore, laŭ niaj etaj ebloj, sendis al Fonduso de Solidareco monsubtenon por /.../Kolumbio post erupcio de vulkano /Starto, 6/1985, pĝ. 6/
 - Al tiaj esperantistoj apartenas ekz., argentianoj, brazilanoj, ĉinoj, jugoslavo, kolumbianoj, poloj, peruanoj, meksikanoj kaj zairanoj /.../ /Monato, 1/1986, pĝ. 25/
- Aglokula leganto tuj rimarkos, ke en tiuj frezoj la formoj "Kolumbio" kaj "kolumbianoj" ne estas ĝustaj. Laŭ la kuntekstoj temas pri lando en Sudameriko, kiu nomiĝas en Esperanto Kolombio, kaj kies loĝantoj estas kolombianoj. La kaŭzo de la erara lingvouzo estas konfuzo inter du similformaj loknomoj, Kolombio /hispane Colombia/, kaj Kolumbio, parto de la nomo de kanada provinco nomata Brita Kolumbio /angle British Columbia/. Estas eĉ trovebla en publikitaj verkoj en Esperanto la kontraŭa eraro: La kanada provinco aperas kiel Brita Kolombio!

2. Alvoko por transbaptado de gentoj

En pamfletca publikigaĵo titolita "Reeĝoj pri la artikolo "ORTOGRAFIO DE PROPRAJ NOMOJ" /Horizonto de Soveta Litovio, kajeroj 5, 6 kaj 7/, la redakcio de HSL provas defendi nociojn pri la ortografio de propraj nomoj en Esperantaj kuntekstoj kaj ankaŭ pri la landnoma nomeklature en Esperanto. La esenco de la diskuto temas pri propono uzi kiel indikilojn de lando nur "-io" kaj "-lando"; oni volas tute forigi aŭ arkaikigi "-uj". La redakcianoj de la litova revuo, serĉante reguligon de la "jam tudenta problem" de sistemo de landnomoj en Esperanto, kunmetis diversajn komentojn kaj kritikojn pri la citita artikolo, sed estas klare, ke la vera celo de la aŭtoroj de la sespaĝa "reeĝado" estas firme apogi la vidpunktojn de la verkinto de la artikolo en HSL. Ili insistas pri la uzo de sensufiksaj Esperantaj nomoj de gentoj kaj kreas plurajn novajn nomojn de popoloj, inter kiuj svarmes aŭstraloj, braziloj, zairanoj ks.

En mie rebat-artikolo kontraŭ la misaĵoj en la rezonado de la aŭtoro de la pridiskutita artikolo, mi montris, ke se oni analizas landnomojn laŭ la ortografia teorio de la "litova skolo", en la sudamerika lando Kolombio loĝas kolumboj! Tamen, ĉar ili rifuzas akcepti la vortformon "kolombianoj" /la ĝustan nomon de la loĝantoj de Kolombio/ kaj ĉar "kolumboj" kaŭzas iom de embaraso, ili elpensis manieron malhelpi la miskomprenon, ke la loĝantoj estas birdoj. Atencante la suverenecon de Kolombio, ili, sen peto aŭ permeso, transbaptas la popolon kolumboj! Per "nur korakto de unu litero", la HSL-anoj modifas la nomon de sendependa lando kun 25 000 000 loĝantoj. Per tiu "korekto" ili aŭdace ŝanĝas ankaŭ la historion de

la lando, kaj impertinente opinias, ke tiu trudita nova nomo estas "honora", ĉar tiel videblas, ke la popolo estas "pranepoj de Kolumbo".

3. Mokonstato pri la komplikeco de la problemoj

Tiu facilanima traktado de gent- kaj landnomo memorigas min pri simila mispaŝo de A. Albault, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, kiu surbaze de same perfortita rezonado, donis al la portugaloj novan nomon - portujoj! Ĉu la redakcio de HSL ne scias, ke oni ne povas tuŝe-fuŝe ŝanĝi unu elementon de tradicia lingvouzo sen kaŭzi perturbojn aliloke en la sistemo? Ni uzu la ekzemplon de la transŝanĝo de Kolombio al Kolumbio por montri, kiel la adeptoj de la litova skolo de esperantologio falas en neelireblan abismon.

En la angleparolantaj landoj Usono kaj Kanado estas uzata por loknomoj Columbia. Almenaŭ ses urboj en Usono portas tiun nomon, krom la District of Columbia, kie situas la ĉefurbo Vaŝingtono, kaj ankaŭ granda universitato en la urbo Nov-Jorko. Plue, Columbia estas la nomo de arкта kabo, usona altebenaĵo kaj rivero. En Kanado ĝi aperas kiel la nomo de la sama rivero, kaj ankaŭ monto kaj provinco /British Columbia/. La Esperanta formo de Columbia en pluraj konsultlibroj estas Kolumbio. Mi scivolas, kiel la HSL-anoj nomas la usonajn urbojn kaj kanadajn provincanojn. Ĉu ili estas kolumbianoj aŭ ĉu ankaŭ ili estas kolumboj, pranepoj de Kolumbo kaj kuzoj de la sudamerikaj kolumboj?

4. Estigas ankaŭ kontraŭdiraj nomformoj

Ni ankoraŭ ne povas halti. En Meksiko kaj Brazilio estas urboj kun la nomo Colombia kaj Colmbia respektive. Laŭ la litova skolo de verda etnografio, iliaj loĝantoj estas frataj kolumboj. Krom Columbia, la nomo Columbus estas uzata por nomi lokojn - ne malpli ol ok urbojn en Usono kaj ankaŭ en la pasinteco la insulojn, kiuj hodiaŭ estas konataj kiel Galapagoj. Ili estas esperantigitaj same kiel la familia nomo de la malkovrinto de Ameriko, Kolumbo. Kiel, do, volas la redakcio de HSL nomi la loĝantojn--kolumboj aŭ kolumbanoj? Kiel povas kolumbo esti en unu parto de la mondo la nomo de homo apartenanta al certa gento kaj en alia parto la nomo de urbo? Por fini, mi donas al la anoj de la litova skolo hejmtaskon por iomete ŝvitigi iliajn kapojn: klarigu la nomon Kolombo, kiu estas la ĉefurbo de Srilanko, kaj nomu ĝiajn loĝantojn.

Estas ja evidente, ke la redakcio de HSL ne havis en siaj manoj la legendan ovon de Kolumbo, kiam ili komencis meti ordon en la land- kaj gentnoma nomenklatureto de Esperanto. Post kovado, el ilia ovo venis ne bela, blanka kolombeto, sed naŭza, nigra "kolumbaĉo"!

Adolf Staŭra:

DE KIE VENIS LA SUPERSIGNITAJ LITEROJ?

En PIV, sub la kapvorto "ataki", oni povas legi la eldiron de Zamenhof: "La plej atakata flanko de nia lingvo estas ĝia alfabeto". Oni konas la kialon de tiuj ĉi atakoj. Esperanto ignoras la "internaciajn" literojn ĉh, q, w, x, y kaj uzas la "ĉapelitajn": ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj la literon ŭ. La cirkumfleko estas konata en mondlingvo, kia estas la franca, sed tie ĝi aperas super vokaloj. Kaj Zamenhof metis ĝin super konsonantojn.

Gaston Waringhien en PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO mencias en la § 3, ke "Tiu sistemo de sonprezentado estis inspirita de la ĉeĥa alfabeto /en kiu cetera la cirkumfleko estas returnita/". Kontraŭ tio esprimis sian opinion Bernard Golden, ke Zamenhof ne sciis la ĉeĥan lingvon.

Tiu ĉi opinio povas esti ĝusta. Tamen aperas la demando: ĉu Zamenhof devis scii la ĉeĥan lingvon, por ke li imitu la ĉeĥajn literojn. Sufiĉis ja, ke li ie nur vidu la ĉeĥan tekston aŭ almenaŭ ĉeĥan nomon kaj tio jam povis vekii lian intereson- ja li estis lingvolernemulo, kiel atestas lia letero al Alfred Michaux: "...mi libere parolis nur en tri lingvoj /ruse, pole kaj germane/, la lingvon francan mi legas libere, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiun mi konas tamen nur tre malmulte, kaj nur teorie".

1/ Kvankam Varsovio situis en Ruslando dum la vivo de Zamenhof kaj la ĉeflingva teritorio estis parto de Aŭstrio-Hungario, la teritorioj ĉeĥa kaj pola ĉiam estis najbaraj. Tial oni povas esprimi kelkajn konjektojn, ke Zamenhof iel konatiĝis kun la ĉeĥa alfabeto. Jen kelko da tiaj.

La patro de Ludoviko, Marko Zamenhof, estis dum iu tempo ankaŭ cenzuristo de publikaĵoj sendantaj en Ruslandon el eksterlando. Kvankam li ne sciis la ĉeĥan lingvon, hazarde li povis alporti hejmen el sia oficejo ian ĉeĥaĵon, kiun Ludoviko povis vidi.

Pri sia studado en Moskvo skribas Zamenhof: "Miaj moskvaj kolegoj estis reprezentantoj de tre multaj plej diversaj rasoj....."

2/ Ne mirige, se inter ili estis iuj ĉeĥoj, kun kiuj povis Zamenhof konatiĝi kaj vidi ĉe ili la ĉeĥan skribon.

Memkomprene, ankaŭ en Varsovio ekzistis ebleco hazarde renkontiĝi kun ĉeĥoj. Tamen tiuj ĉi konjektoj, krom la unua, povas validi ankaŭ por la lingvoj litova kaj latva, en kiuj ekzistas la literoj ĉ, ĝ, ĥ, sed la litovaj publikaĵoj - ĝis la jaro 1905 - estis presataj en Germanio kaj nur kontrabande ili povis veni al siaj legantoj en Litovio.

3/ Kaj la ĉeĥan literon "š" uzis jam la litova aŭtoro M. Daŭkša /1538-1612/, dirante: "Kial do litovo ne povus kiel ĉeĥo skribi "š" anstataŭ "sz"?"

4/ Kaj nun faktoj.

Oni ne scias, kiam Zamenhof decidis pri la difinita formo de la alfabeto, sed: "...la imperfekto, kies finiĝo estis -es, restis en la lingvo ankoraŭ eĉ en la komenco de 1887".

5/ Ankaŭ la decido pri la alfabeto povis veni en tiu tempo.

En 1885 Zamenhof praktikis kiel kuracisto en la litova vilaĝo Veisiejai. Li havis do eblecon ekscii pri ekzisto de la literoj ĉ, ĝ, ĥ en la litova lingvo, ĉar - kiel mencias J. Petrulis - "kun la lokaj loĝantoj /Zamenhof/ interkompreniĝadis litovlingve".

6/ En 1886 Zamenhof "...lernis kelkan tempon en la kliniko de Vieno."

7/ Kaj tio estas grava fakto por nia rezonado, ĉar kiel venis Zamenhof el Varsovio en la aŭstrian metropolon? Ja per trajno, kaj tial li tute certe veturis el Varsovio la plej mallongan vojon tra la ĉeĥa teritorio - de Bohumín al Ostreva kaj Přerov ĝis Brĉelav. El la vagono li povis vidi la ĉeĥajn nomojn de haltejoj /apud tiaj oficialaj germanaj/ sur tabuloj kaj aliajn ĉeĥajn surskribojn.

En Vieno ekzistis tiam multnombra ĉeĥa minoritato, ankoraŭ nun vivas tie multe da ĉeĥoj. Studis tie ĉeĥoj, kiuj uzadis la germanan lingvon same bone kiel sian gepatran, multe da ĉeĥoj laboris en la

urbo. Oni povis facile renkonti ĉefojn kaj vidi ĉefajn publikaĵojn. Se do Zamenhof sciis pri la signifo de la ĉefaj "cirkumfleksoj", li povis scii ankaŭ pri la ĉefa vokalo "i". Kune kun la fakto, ke la germana lingvo estis tiam presata kaj skribata per "angulplena" frakturo - skribante ĝin, oni ĉiam uzis "hoketon" super u - oni povas facile konkludi kiel li elpensis la literon "ŭ". Cetere en la litova lingvo ekzistas ŭ kun supersigno - horizontala linieto.

Eble estas jam sufiĉe pruvite, ke Zamenhof povis koni la signifon de la ĉefaj "hoketoj" /la ĉefa nomo estas hāček - hoketo/ kaj ĉar li sciis la francan lingvon kun cirkumfleksoj, li kunkombinis ambaŭ manierojn kaj kreis la praktikaĵajn literojn. Oni povas aldoni, ke li "francigis" sian eltrovon, kreinte la literon "ĵ", ĉar tiamaniere estas prononcata la franca "j". En la ĉefa, litova kaj latva lingvoj ĝi estas skribata "ž" - duoblaĵo de "z". La litero "ĝ" estas tute certe inspirita per la angla prononcado de "g", kaj "h" estas nur logika finpenso de la tuta literovico; francoj kaj angloj skribas tiun ĉi fonemon "kh", ekzemple en la rusaj nomoj; germanoj, ĉefoj kaj litovoj uzas "ch".

Tiel povus esti klarigita la estiĝo de la malfeliĉaj E-literoj, sed la afero povis okazi tute alimaniere. Nome, en la pola lingvo ekzistas la literoj "ć" kaj "ś" - "molaj" fonemoj, sonantaj nek kiel "c", "s", nek kiel "ĉ", "ŝ". Kaj tiuj ĉi du literoj povis inspiri Zamenhof-on kaj kondukis lin, pro lia scio de la franca, ke li kreis niajn Esperantajn supersignitajn literojn.

Fine, ni volas ankoraŭ mencii, ke estis la pola lingvo, el kiu Zamenhof prenis la akcenton por Esperanto. El la tri lingvoj, kiujn li "libere" parolis, nur la pola havas tute regulan akcenton sur la antaŭlasta silabo. La neregula rusa akcento eĉ influas prononcadon de vokaloj, ekzemple oni skribas "okno", la pluralo estas "okna" /fenestro - fenestroj/, sed oni prononcas "aknó" - okná". Kaj la akcentado de la antaŭlasta silabo estas avantaĝa por Esperanto, ĉar ĝi ofte emfazas sufiksojn.

- 1/ Enciklopedio de Esperanto, p. 580
- 2/ Samfonte sur la sama paĝo
- 3/ Samfonte, p. 351
- 4/ La informon donis al mi letere A. Vaitilavičius, redaktoro de Horizonto de Soveta Litovio, laŭ la libro Historio de litova literatura lingvo.
- 5/ PIV, p. 417
- 6/ Horizonto de Soveta Litovio, 4/1979, p. 22 en "Zamenhof kaj Litovio"
- 7/ Enciklopedio de Esperanto, p. 580

Miroslav Malovec

ESPERANTO KAJ MAŝINOJ

De tempo al tempo ankoraŭ aperas en la E-gazetaro artikoloj, kies aŭtoroj timas, ke la E-alfabeto kun supersignoj ne taŭgas por komputado, kaj ke la supersignoj estas obstaklo por disvastigi Esperanton. La aŭtoroj postulas forigi ilin. Tial mi volas informi pri la ekzisto de la internacia normo ISO 6937, kies dua parto pre-

zentas ĉiujn literojn kaj dialektitajn signojn de 39 Eŭropaj naciaj lingvoj /uzantaj la latinan alfabeton/ kaj de Esperanto. Ankaŭ por la Esperantaj literoj ekzistas kodoj por uzo en la komputado. La envicigo de Esperanto en la normon estas prestiĝa afero por la Internacia Lingvo, sed tiu prestiĝo ne aperus, se Esperanto ne havis siajn supersignojn, ĉar oni simple ne sentus mencii Esperanton en la normo.

Malsupre mi prezentas kelkajn detalojn el la normo. Ĉar mi vidis la anglan version, mi lasas ĉion en ĉi tiu lingvo pro aŭtenteco.

NORMO: ISO 6937 - Coded Character Set for Text Communication

Part 2: Latin Alphabetic and Non-alphabetic Graphic Characters

LINGVOJ: Albanian, Basque, Breton, Catalan, Croast, Czech, Danish, Dutch, English, Esperanto, Estonian, Faroese, Finnish, French, Frisian, Gaelic /Irish/, Gaelic /Scottish/, Galician, German, Greenlandic, Hungarian, Icelandic, Italian, Lepp. Lettish, Lithuanian, Maltese, Norwegian, Occitan, Polish, Portuguese, Rhaeto-Romanic, Romanian, Slovak, Slovene, Spanish, Swedish, Turkish, Welsh, Wendish

KODOJ:	Identifler	G0	G2	Symbol	Name or Description
LC 15	6/3	4/3	c		small c with circumflex
LC 16	4/3	4/3	C		capital C with circumflex
LG 15	6/7	4/3	ĝ		small g with circumflex
LG 16	4/7	4/3	G		capital G with circumflex
LH 15	6/8	4/3	h		small h with circumflex
LH 16	4/8	4/3	H		capital H with circumflex
LJ 15	6/10	4/3	j		small j with circumflex
LJ 16	4/10	4/3	J		capital J with circumflex
LS 15	7/3	4/3	s		small s with circumflex
LS 16	5/3	4/3	S		capital S with circumflex
LU 23	7/5	4/6	ŭ		small u with breve
LU24	5/5	4/6	Ŭ		capital U with breve

KLARIGOJ:

G0 - kodoj de literoj; G2 - kodoj de supersignoj
La kodoj estas en komputiloj uzataj en binara /duuma/ formo, ekzemple: 4/3 - 100/0011

La komputiloj ne restos por ĉiam "stultaj". Ili jam nun scias skribi ne nur en ĉiuj latindevenaj alfabetoj, sed ankaŭ en multaj aliaj. Post kelkaj jaroj la problemoj de la Esperantaj supersignoj ne ekzistos plu.

Korekto de eraroj

En la 3-a kaj 4-a n-roj de Starto aperis kelkaj eraroj, pro kiuj ni pardonpetas la aŭtorojn kaj la legantojn.

En la 3-a n-ro sur la 21-a paĝo, 13-a linio de sube devas esti: ne havas inter si akrajn limojn...

En la 4-a n-ro, paĝo 12, 20-a linio de sube anstataŭ -Beaufort- devas esti ĝuste -Beaufront-, sur paĝo 14, 17-a linio anst. -Kanto- devas esti -Kaino-, sur paĝo 15, 6-a linio de sube anst. -kiajn- devas esti -kiaj-, sur paĝo 20, 5-a linio anst. -pro-paĝo- devas esti -propagando-.

Redakcio

Sur la kovrilo: Vintra desegnaĵo de Mirka Tomečková el České Budějovice



ESPERANTOLOGIO en la NACIA LINGVO

En Jugoslavio aperis du nacilingvaj verkoj pri Esperanto.

Petro Stojan: "Porijeklo i život jezika esperanta" estas la nacilingva titolo de la originala verko "Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto". Sur 60 paĝoj ĝi entenas ideojn kaj konstatojn el la prelegoj de la aŭtoro, makedondevana ruso mortinta en Francio (1961). Stojan dividis sian traktaĵon en 25 ĉapitrojn, inter kiuj plej ampleksas la dua, inaŭgurita per "La lingvo de Zamenhof". La tekston tradukis Josip Pleadin.

"Język i międzynarodno komuniciranje" sur siaj pli ol 200 grandformataj paĝoj prezentas prelegojn kaj traktaĵojn auditajn dum la scienca simpozio, okazinta en Sarajevo, honore al la Jaro de komunikado proklamita fare de Unuigintaj nacioj. 21 profesoroj kaj aliaj fakuloj el Jugoslavio prezentas siajn opiniojn pri la sociologia, lingva, komunika, kultura, jura, filozofia kaj teknika aspektoj de la lingvoj generale kaj en rilato al la Internacia Lingvo. La libron ĉefredaktis Senad Ćolić. (Lau Emilija Lapenna en "Voĉo de Handikapuloj" 1-2'87)

Sisteme ordigita vortaro

Kompilis ĝin Michele Mariano. Eldonis ĝin Plejado - Gabrielli, 1986. 526 paĝoj, 21 x 33 cm. Scienca eldonserio n-ro 3. Laŭtema vortaro, en kiu ĉiu vorto havas sian difinon, ĝi estas samtempe vortaro de sinonimoj kaj antonimoj. Ĝi estas pli bone aranĝita ol "Roget's International Thesaurus", ĝis nun la plej bona tiaspeca vortaro. (Esperanto, 5/1987)

Jubilea solenaĵo en Madagaskaro

La nacia kunordiga komitato pri la Jubilea Jaro organizis solenaĵon en la madagaskara ĉefurbo Antananarivo la 4-an de februaro. Auspiciis ĝin la prezidanto de la Nacia Popola Asembleo, s-ro Andrianaharinjaka kaj la prezidanto de la nacia Kultura kaj Socia Komisiono, s-ro Rakotoniana. (Esperanto, 5/1987)

Nova asocio en Togolando

Je la 21-a de marto 1987 fondiĝis la "Unuigo Togolando por Esperanto", post preparoj fare de Koffi Gbeglo kaj Mensah Agbemadon, la du pioniroj en Togolando. En la nova asocio prupigas du apartaj kluboj de Lomé kaj tri grupoj en aliaj urboj. Adreso de la nova asocio: UTE, B.P. 13369, Lomé.

Franca medaliono

En Parizo aperis medaliono honore al la Jubileo, fare de oficiala monfabrikoje "Monnaie de Paris" kaj desegnita de Serge Santucci.

Esperanta tulipo

En Nederlando aperis nova tulipo kun la nomo "Tulipa viridiflora Esperanto". Ĝin kreis s-ro J. Pranger, kiu jam en 1960 havigis la unuajn bulbojn, sed bezonis 25 jarojn por multobligi ilin. La petaloj estas verdaj kun ruĝa rando; la folioj estas verdaj kun blanka rando. (Esperanto, 5/1987)

Esperanto-novaĵo al registaroj

En la sidejo de UNESKO en Parizo, UEA transdonis Premion Zamenhof al la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadu Mahtar M'Bow, en 1986-12-16. La salutparolado de s-ro M'Bow en presita formo estis sendita de Unesko laŭ kutima kanalo al ĉiuj registaroj, ĉiuj NROj (neregistraj organizoj ligitaj kun Unesko) kaj aliaj. La dokumento (DG/86/52) havas la titolon "Parolado de s-ro Amadu Mahtar M'Bow okaze de la celebrado por marki la 100-jariĝon de la kreo de Esperanto". Estas granda signifo, ke krom cent-sesdeko da registaroj (la naciaj Unesko-komisionoj) centoj da NROj (kategorio A: 43; B: 236; C: 263) ricevis la paroladon. Des pli grave por ni estas, ke la ĝen. direktoro de Unesko rememorigis al la registaroj pri la rezolucio pri la 100-jariĝo de Esperanto, per sia cirkulera letero CL/3021, jam en 1986-10. La rememorigilon akompanis la rezolucio, por ke oni ne bezonu retrafoliumi la dikan rezoluciaron de la

ĝenerala koncerenco de Unesko en Sofio. Bedaŭrinde s-ro M'Bow, komprenanto pri la bezonatenco de Esperanto, ne plu re-kandidatiĝos por la ofico de la ĝenerala direktoro post 1987 - ofico, kiun li plenumadis ekde 1974.

("UN kaj Ni", n-ro 44)

La dua Internacia Akademio Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto

La Ĉina Akademio de Sciencoj decidis okazigi en Pekino la nomitan konferencon de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1988. La ĉefa temo de la konferenco estos "La reciproka influo de la scienco kaj tekniko kaj la socio". Ĝi konsistas el jenaj eroj: "La influo de la nova teknika revolucio sur la nuntempa ekonomio kaj socio"; "Kiel la novaj teknikoj ŝanĝas nian ĉiutagan vivon?"; "La socia utiligo de scienc-esploraĵoj fruktoj"; "Nuntempaj medicinaj teknikoj pri sanprotektado, kuracado kaj preventado" kaj "La nova teknika revolucio kaj daŭra edukado". La preparadon pri la konferenco plenumas la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tiuj, kiuj deziras partopreni ĝin, sendu la tekston de sia disertaĵo aŭ la fino de januaro 1988 al jena adreso: Sekretariejo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52, Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

(El Popola Ĉinio, 7/1987)

Unesko kaj Esperanto

Ampleksan nacilingvan artikolon pri la 40-jariĝo de Unesko kaj 100-jariĝo de Esperanto aperigis en la ukraina ĵurnalo "Pivdenna zorja" (Suda aŭroro) en Berdjansk, Ukrainio, s-ro M. Popov, kandidato de fizikmatematikaj sciencoj, docento de Berdjanska pedagogia instituto, adjunkto de Akademio Internacia de Sciencoj.

Pluaj eminentaj sukcesoj de E-filatelistoj

Dum la tagoj 29.08.-6.09.1987 okazis en urbo Kroměřiz la Tutstata tema ekspozicio de poŝtmarkoj "Temafila Kroměřiz 87", kie ankaŭ sukcesis membroj de Esperanto-sekcio ĉe Asocio de Ĉeĥoslovakaj filatelistoj per siaj eksponaĵoj.

Plej altan premion de la ekspozicio, grandan orumitan medalon, gajnis per sia eksponaĵo "Ĉapitroj el historio de Esperanto" s-ano Vláša VANA el urbo Plzeň.

Grandan arĝentan medalon gajnis s-ano Dolfa BARTOSÍK el Praha por sia tutmonde konata eksponaĵo: "Historio kaj nuntempo de Esperanto".

Malgrandan arĝentumitan medalon gajnis s-ano Alois JAKUBEC el urbo Hranice, por sia eksponaĵo: "Esperanto - internacia lingvo". -espo-

Internacia Esperanto-Propaganda Biciklado tra Eŭropo

La aranĝo okazis en aŭgusto ĉi-jara kaj la biciklantoj trapasis nian landon jene: la 13-an de aŭgusto tagmeze ili transiris la statlimon kaj venis al urbo Turnov, kie ili estis je la 16-a horo antaŭ urbodomo, la 14-an ili venis en Pragon kaj s-ano J. Mařík aranĝis por ili akcepton ĉe ĵurnalistoj de Mladá fronta (sed la intervjuo verŝajne ne aperis), la 15-an ili estis en Plzeň kaj biciklis al Germanio. Sed denove la 25-an de aŭgusto ili estis en Bratislava.

Nova Zamenhof-placo en Francio

La tutnova SQUARE DOCTEUR ZAMENHOF estis oficiale inaŭgurita la 10-an de majo en CHAMBERY, Francio. La tabulon kun la nova nomo malkovris s-ro C. Turzanski, ĝenerala konsulo de Pollando, kaj A. Gervason, vicurbestro de Chambéry. Dum la ceremonio la E-Grupo transdonis al la vicurbestro la amason da 438 gratululetoj destinitaj al la urbkonsilio, kiu unuanime decidis tiele honoru Zamenhof. Tiuj gratululetoj venis el 44 diversaj landoj, inter ili 14 el Ĉeĥoslovakio. La E-Grupo Chambéry kore dankas al ili.

(R. Boré)

Metiejaĵ Kulturtagoj de Junaj Esperantistoj en Halle

Inter la 25-a de februaro kaj la 2-a de marto 1987 Distrikta Estraro Halle de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR la duan fojon okazigis la Metiejaĵ Kulturtagojn de junaj esperantistoj, ĉi-foje en internacia kadro. Partoprenis ĉ. 90 gejunuloj el Bulgario (4), Ĉeĥoslovakio (4), GDR (43), Hungario (1) kaj Pollando.



- 1/ El la "Metieaj Kulturtagoj de junaj Esperantistoj" en Halle - Litografio en la Centro por plastika arto
- 2/ Lo Zhijun kaj Verda Dian/en la E-flago/el la memlerna grupo de la Chengdu-a Esperanto - Ligo
- 3/ Inaŭguro de la skvaro Doktoro Zamenhof la 10a-n de majo 1987 en Chambéry, Francio. Sur la foto s-ro Turzanski, ĝenerala konsulo de Pollando, kaj s-ro Gervason, loka vicurbestro. / Foto: "Le Dauphine Libéré"/
- 4/ Kievaj kursaninoj preparas fotogazeton pri la kurso. Meze sidas Svetlana Pogorelaja
- 5/ Kovrilpaĝo de "Novaĵoj el Halle"

(37). Celo estis la praktika pliperfektigo de junaj artaj talentuloj esperantistaj en internacia medio. La "metiejo" konsistis el la jenaj laborgrupoj:

- 1 - Plastika arto (litografio, linoleŭma gravurado)
- 2 - Figura arto (kabareta grupo, danc-grupo)
- 3 - Muziko (kantoj por la paco, popolkaj amantoj el diversaj landoj)
- 4 - Literaturo (tradukado, poezio, recitado)
- 5 - Fotografado (fotado, rivelado, aranĝo de ekspozicio).

Vespere la partoprenantoj vizitis operon en la Landa Teatro Halle kaj ĉambromuzikan koncerton. Grandan intereson trovis speciala gastprezentado de la fama ensemble "Solidaritāt", al kiu apartenas amatoraj artistoj el kvar kontinentoj logantaj nuntempe en GDR. Dum prezentado de la historia salboligado en la Teknika Halloren- kaj Saline-Muzeo, dum vizito de la naskiĝdomo de la fama komponisto Georg Friedrich Händel kun e-lingva magnetofona gvidado kaj ekskursante al la urboj Bernburg kaj Naumburg la gejunuloj povis konatigi kun la historio de la urbo Halle kaj kun vidindaĵoj en la distrikto.

Kulmino de la Kulturtagoj estis la antaŭlasta vespero, kiam la laborgrupoj prezentis la plej bonajn rezultojn de sia ekzercado. Honora gasto estis profesoro Gertrud Sasse, honora prezidantino de Kulturligo kaj membrino de Popolcambio de GDR (plej alta ŝtata organo). Krome ĉeestis reprezentantoj de la Distrikta Konsilio Halle kaj de kulturaj organizaĵoj. Post la prezentado s-ino prof. Sasse laudis la arangon publike esprimante, ke ŝi travivis vere sencohavan libertempan aktivadon de la junularo.

Dum forumo pri la temo "Kiel mi povas kontribui al la konservado de la paco?" la partoprenantoj diskutis kun reprezentanto de Distrikta Estraro de Libera Germana Junularo. Rudolf Burmeister el Karl-Marx-Stadt prezentis filatelajn eksponaĵojn, kaj Helga Plötner (profesia grafikistino) ekspoziciis portretojn kaj grafikaĵojn el sia propra kreado.

Okaze de la Metieaj Kulturtagoj la organizantoj eldonigis filatelian tutafan

(poŝtkarton) kaj specialan poŝtstampon. La loka kaj landa gazetaro publikigis 9 artikolojn pri la kulturtagoj kaj Radio GDR disaŭdigis 5minutan intervjuon.

La Metieaj Kulturtagoj 1987 estis la kontribuo de E-Junularo de GDR okaze de la centjarigo de Esperanto. La GDR-aj gejunuloj preparis sian kontribuon por la Internacia Vespere dum la LJK en Krakovo.

DE Halle de GDREA intencas organizi la Kulturtagojn ankaŭ en 1988 kaj dezirus akcepti pli internacian kaj pli fakan partoprenantaron kaj atentigas, ke ne temas pri nura turisma aranĝo.

(Hans-Peter Bartos
prezidanto de DE Halle kaj
membro de CE de GDREA)

Nova revueto en GDR: NOVAĴOJ EL HALLE

Okaze de la centjara jubileo de Esperanto Distrikta Estraro Halle de GDREA ekde 1987 eldonadas la informilon "Novaĵoj el Halle", kiu informas la asociojn kaj aliajn interesulojn pri la aktivecoj de GDREA, pri la senco de la okupigo pri Esperanto kaj pri aktualaj eventoj de la internacia E-movado. La revueto aperadas sesfoje jare po 8 paĝoj. La enhavo estas ĉefe germanlingva, sur la lasta paĝo estas e-lingvaj rakontetoj, poemoj, humuro ktp. Adreso de la redakcio:

Kulturbund de DDR
Bezirksvorstand Esperanto
PSF 161
Halle
DDR - 4010

Chengdu-a Esperanto-Ligo de Ĉinio

La parollingva kaj memlerna grupo de la Chengdu-a Esperanto-Ligo fondigis en 1984-9-27 kaj ĝis nun ĝi kunvenas regule dufoje en ĉiu semajno. Unu el instruistoj estas Verda Dian. Por bonvenigi la centan datrevenon de Esperanto la Chengdu-a E-Ligo okazigis la mobilizon kunvenon en 1987-03-01. La kunvenon partoprenis ankaŭ juna s-ino Lo Zhijun, kiu laboras en la Chengdu-a Akrobata Grupo (vidu la foton sur la apuda paĝo).

(Dian Ewen, Chengdu)

● ● ● kluba vivo

Renkontigo B - B - B 1987

Jam tradicia renkontigo de esperantistoj el urboj Brno, Bratislavo kaj Budapeŝto okazis la unuan oktobran semajnfino (1987-10-2/4). La organizanto de la renkontigo la E-klubo el Brno elektis por loko de ĝia okazaĵo pitoreskan naturmedion de Moravia Karsto. La loko, kie estis la partoprenantoj de la renkontigo logigitaj - politikeduka centro de SSM, Poznaň en Blansko-Češkovice, estas bela, moderne establita konstruaĵo, kiu donis al ĉiuj partoprenantoj agrablan kaj komfortan restadon. La renkontigon partoprenis 40 gesamideanoj ne nur el la menciitaj urboj, sed ankaŭ el aliaj lokoj de Bohemio, Moravio kaj Slovakio. Domage, ke partoprenantoj el Hungario estis tiel malmultaj, nur du. Tamen la etoso de la renkontigo estis bonega. Ankaŭ ĝia programo estis bela kaj interesa. Post alveturo kaj logigo de partoprenantoj vendrede okazis interkona vespero, sabate antaŭtagmeze dum perbusa ekskurso vizitis la partoprenantoj groton "Balcarka", Funkva-grotojn kaj abismon Macocha, posttagmeze poste la kastelon Rájec. Post reveno, ankoraŭ antaŭ vespermango, okazis koncerto, kie artistoj el Brno kantis kaj dancis komponaĵojn de A. Dvořák kaj G. Bizet. Iuj el la programeroj estis prezentitaj esperantlingve. Vespere okazis projekciado de diapozitivaj el kongreso en Varsovio, komentita de samideanoj, kiuj en Varsovio ĉeestis. Dimance antaŭtagmeze vizitis la partoprenantoj de la renkontigo muzeon en Blansko, kie krom rigardo de eksponaĵoj rilatantaj al historio de Moravia Karsto kaj al historio de ferproduktado en ĉi tiu regiono, ili vidis almenaŭ en filmo iujn grotojn de Moravia Karsto, kiuj kvankam tre belegaj, bedaŭrinde ne estas kaj neniam estos alireblaj al publiko. Poste la partoprenantoj de la renkontigo, tre kontentaj kun ĝia paso, disveturis al siaj hejmoj.

(Jiří Procházka)

H A V Í Ř O V

La laborsezono 1986/87 estis finita en junio per kutima pikniko en la ĝardeno de familio Pastrňák. Ankaŭ oni fervore muzikis kaj kantis Esperante. - De 28.IX. ĝis 16.X. okazis ekspozicio de esperantaĵoj, kiun arangis prez. Zdeněk Heiser, en la halo de Petr Bezruč-Kulturdomo. En septembro daŭrigis kurso por progresintoj kaj en oktobro ekis kurso por komencantoj. La 15-an de okt. rakontis M. Pastrňák pri sia vojaĝado en Monako kaj suda Francio norden ĝis Nurenbergo kaj prezentis diapozitivajn. La ĉeestantoj estis informitaj pri la nova Centra Komitato de ĈEA.

(A.St.)

K A R L O V Y V A R Y

La 25-an ĝis la 27-an de septembro okazis en subermontara vilaĝo RADOŠOV (kiu troviĝas apud malgranda banloko Kyselka en distrikto Karlovy Vary) jam la 10-a Turisma Renkontigo de Ercmontaraj Esperantistoj. Venis pli ol 40 esperantistoj, ne nur el Ercmontaro, sed ankaŭ el diversaj urboj kaj urbetoj de ĈSSR kaj kompreneble ankaŭ el GDR, ĉar laŭ kontrakto pri reciproka amikeco inter ambaŭ Esperanto-kluboj, Karlovy Vary kaj Schwarzenberg, estas tiuj ĉi renkontigoj arangataj ĉiujare alterne, foje en germana, foje en ĉeĥa flanko de Ercmontaro.

Nunjare oni bonvenigis ankaŭ gastojn el Pollando, al kiuj tre plaĉis tiu ĉi amika medio.

Partoprenantoj kiel ĉiam faras ekskursojn tra interesaj partoj de Ercmontaro - nunjare ili rigardis naturajn belajn lokojn en la valo de submontara rivero Ohře. Kvankam vetero ne estis tro agrabla, tamen piedmarsantoj atingis naturrezervejon sur kaj cirkau monto Semná-roko kaj ruinaĵojn de mezepoka burgo Angel-monto, vizitis ankaŭ urbon Ostrov kaj rigardis tie kastelan ĝardenon. Kelkajn minutojn ankaŭ rememoris suferon de arestitoj en iama koncentrejo (komence de la II-a mondmilito nazianoj fa-

Suplemento al STARTO 7 (1988) 25-28

Eldonas ĈEA, Praha

ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing.Ivan Špička kaj Ing.Jindřich Novák

proprajn manradikojn aŭ frapsurfacojn. Tiel vundiĝinte vi estus eligitaj por longa tempo de la ekzercigado. Se estas ĉio farata ĝuste, post unu aŭ du jaroj da ĉiutaga ekzercigado oni ordinare kapablas knokaŭti eĉ tre rezistivan atakanton, memkomprene se oni trafas lin ĝustaloken kaj ĝustatempe.

Uzante la molan frapitaĵon, oni komencas ekzerci frapojn el kurta distanco kaj memkomprene malforte. Nur iom post iom oni plipezigas la frapojn kaj komencas frapi el plena distanco. Ni ne rekomendas fari en tiu ĉi ekzerc-fazo pli ol 50 - 100 frapojn ĉiutage po 10 - 20. Tamen eĉ tiun ĉi nombron da frapoj oni atingu pograde. En la reduktita kurso oni ne povas ellerni tre pezan frapon. Frapadi la molan frapitaĵon estas proksimume ĉio, kio estas rekomendebla. Por la celoj de la majstre komprenata ekzercigado oni tamen devas aliri pograde al pli malmolaj frapitaĵoj kaj fine frapadi eĉ elastan muron. Certe ne estas necese rememorigi, ke tiel povas alceli sian trejniĝon nur negranda nombro de homoj kaj ke ili devas trejni sin sub gvido de iu, kiu kapablas ne sole frapi peze, sed kiu havas ankaŭ necesajn pedagogiajn spertojn por transdoni sian scipovon. Pli detale oni skribas pri tiu ĉi problemaro en jenaj ĉefaj verkoj (5,6).

2.4.2. Eleksteraj betoj (9 linioj, fig.15, t.e. 3 desegnaĵoj)

2.4.2.1. Elekstera tord-brakofrapo (21 linioj, fig.16, t.e. 5 desegnaĵoj)

2.4.2.2. Elekstera manfrapo (18 linioj, fig.17, t.e. 3 desegnaĵoj)

2.4.3. Manfrapo (aŭ hako) flanken (30 linioj, fig.18-22, t.e. 19 desegnaĵoj)

2.4.4. Elsupra hako (4 linioj, fig.23,24, t.e. 2 desegnaĵoj)

2.4.5. Rektpiedfrapo antaŭen (13 linioj, fig.25-27, t.e. 7 desegnaĵoj)

2.4.6. Elsuba piedfrapo

Tiu ĉi KIKO videblas sur fig.28 kaj 29. El la frapo

ĉi tie priskribitaj ĝi estas unu el la plej simplaj por ellerni (la frapcelo estas tibio). Do, se iu volas scipovi almenaŭ "ion" kaj laŭeble plej baldaŭ, ni rekomendas al li tiun ĉi kikon.


Fig.28



Fig.29



Fig.30



Per kio oni piedfrapas el sube

Se oni havas ŝuojn kun malmola plandumo, oni kiku per la pinto. Okaze, ke oni estas nudpiedaj aŭ piedvestitaj en molaj ŝuoj, oni frapu la celon per plandosupro (fig.30).

Frapceloj

Plejofte oni trafu la tibion aŭ la genuon de kontraŭulo. Se li kliniĝas, oni povas sukcese trafi ankaŭ liajn sunen plekson, ventron aŭ eĉ vizaĝon. En la lasta okazo oni devas memkomprene pli levi la genuon de la kikanta gambo ol tiam, kiam oni piedfrapas kontraŭ malpli alte lokitan celon.

2.4.7. Rektapiedfrapo flanken (16 linioj, fig.31,32, t.e. 5 desegnaĵoj)

2.4.8. Alklin-piedfrapo flanken (26 linioj, fig.33, t.e. 3 desegnaĵoj)

2.4.9. Ĵetado per tranĉilo (50 linioj, fig.34,35, t.e. 5 desegnaĵoj)

Tria parto - apliko de batalagoj

3.1. Kiam oni aplikas frapojn

En la ĉapitro 1.6. ni klopodis memorfiksi al la legantoj la principon: bati laŭeble per okazaj rimedoj. Ĉu do entute havas sencon frapi per la supraj aŭ malsupraj membroj? Certe jes. Se ni estas ekzemple devigitaj batali en tereno, kie estas sufiĉe da ŝtonoj, la atakanto, kiu endanĝerigas nin per tranĉilo, perdas, se ni havas ŝtonon, sian avantaĝon. Tamen se li ne estas armita kaj ni ne sukcesis tuj trafi lin per ĵetita ŝtono oportunloken, li povas fari la samon kiel ni. Tiamaniere la kontraŭulo estiĝas por ni pli danĝera, ĉar anstataŭ frapo fare de neinstruita batalanto, kiu ofte ne estas tre danĝera por la trafito, estas aplikata frapo per ĵetita ŝtono. En tiu ĉi okazo evidente estas pli avantaĝe la kontraŭulon frapi per nearmita supra membro aŭ kiki anstataŭ atentigi lin per sia kondukado pri ebleco uzi okazajn rimedojn. Memkomprene la defendanto devas scii oportunan taktikan manovron, kiu ebligas al li eviti laŭeble koincidan atakon fare de kontraŭulo. Ankaŭ se kontraŭulo minacas al la defendanto ekzemple per pistolo, oni ne povas uzi okazajn rimedojn aŭ eĉ komenci serĉi ilin. En ĉiuj ĉi situacioj oni havas nur unu eblecon: en ĝusta momento peze frapi la kontraŭulon per elektita parto de sia korpo. Finfine ekzistas tipoj de tereno, kie oni ne ĉiam trovas bezonan rimedon. Ekzemple, troviĝante sur trotuaro, en granda salono k.t.p., ĉi tie oni fidu preskaŭ sole la proprajn brakojn aŭ gambojn.

Estas necese rememorigi ankoraŭ pri unu afero. Se oni uzas la okazajn rimedojn, tre gravan rolon ludas la disponebla tempo. Ekzistas situacioj, kie oni ne apliku okazan rimedon malgraŭ tio, ke oni troviĝas inter multe da tiuj, ĉar uzante ilin, oni perdus tempon, bezonan por komenci atakon, aŭ oni estiĝus okulfraŭpaj. Ekzemple, se oni vidus, ke necesas komenci batalon kontraŭ ĝenanta grupon, oni povus preteksti nekomprenon pri kio temas. Tiamaniere oni ofte sukcesas relative senriske pliprosimigi sin el la plej forta kaj agresema ano de la grupo kaj neatendite ataki lin. Ekserĉi en ĉi okazo ekzemple bastonon, ŝtonon k.s., signifas perdi iniciativon kaj atentigi la grupon pri siaj intencoj.

3.2. Kiam ataki?

Eble estas evidente, ke se ni scias efektiviĝi pezan frapon enkadre de simpla reagotempo, nia kontraŭulo ne kapablas senefikigi ĝin, pro principaj kaŭzoj, per iu intenco aŭ ellernita defendago. Se oni staras ekzemple mezdistance for de la trafoto, tia frapo jam plenumblas (ekzemple la rektmanfrapo). Sed tiel povas konduki ankaŭ la kontraŭulo. Venkus tiu, kiu frapus pli frue. Finfine estas ankaŭ eble, ke oni faras koincidan atakon kaj trafitaĵas estas ambau batalantoj. Certe ne estas necese atentigi, ke batali senrespekte al danĝero de la koincida atako estus riske. La situaciojn, en kiuj minacas koincida atako, ni nomas trafe-ekvivalentaj (aŭ mallonge: ekvivalentaj).

Se ni volas pligrandigi nian esperon venki, ni klopodu produkti sole la situaciojn, en kiuj ni povas frapi kontraŭulon pli frue ol li frapus nin. Do la situaciojn, en kiuj la atakanto estas handikapita. Post nia sukcesa frapo la trafito ne estas plu danĝera, ĉar li estas ŝokita aŭ alie eligita el la batalo. La situaciojn, en kiuj aŭ la defendanto, aŭ la atakanto estas avantaĝigitaj, ni nomas trafe-ne-ekvivalentaj (mallonge: neekvivalentaj). Dum batalo la defendanto memkomprene klopodas enkonduki la kontraŭulon en neekvivalentajn si-

FRAPO (en batalagologio): ajna batalago, ĉe kiu la kineta energio de iu objekto (armilo, okaza armilo, parto de homa korpo aŭ de tuta homa korpo), efikante la korpon de la kontraŭulo aŭ iun objekton, ŝanĝigas al misforma laboro. Laŭ la korpoparto aŭ objekto, per kiu oni frapas, ekzistas jenaj bazaj klasoj de la frapo: BATOj kaj KIKOj (ĉ: uder).

- I (iun aŭ ion): efektiviĝi FRAPON (kontraŭ iun aŭ ion) (ĉ: udeŝit). BATOj estas speco de la FRAPOj, realigataj per la supra membro de homo aŭ per ĝiaj partoj, eventuale per aliaj partoj de la homa korpo, escepte la gambojn, aŭ per armiloj aŭ okazaj armiloj (rimedoj) (ĉ: ŭhoz).

- I (iun aŭ ion): efektiviĝi BATON (kontraŭ iun aŭ ion) (ĉ: uhodit). KIKOj estas speco de FRAPOj realigataj per la gambo aŭ per ĝiaj partoj (ĉ: kop).

- I (iun aŭ ion): realigi KIKON (kontraŭ iun aŭ ion) (ĉ: kop-nout).

ris el kastelo en Ostrov unuan koncentrejon en ĉeĥa teritorio).

Interesa estis ankaŭ ekskursio al subtero - en teknikan internon de mondfama karlovara "Gejsero".

Ĉar esperantistoj en Ercmontaro ne volas, ke la ŝtata limo disigu krom la regiono ankaŭ la amikecon inter homoj - inter esperantistoj, kiuj logas sur ĝiaj ambau flankoj, interkonsentis la organizantoj de Ercmontaraj Turismaj Renkontigoj, ke venontjare okazos la renkontigo denove. Loko de venontjara renkontigo estos germana ercmontara ripozloko, nomata Antonshöhe.

Prezidanto de Esperanto-rondeto en Schwarzenberg s-ano Rudolf Eichler jam dum la nunjara renkontigo invitis ĉiujn al vizito en GDR.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias pri niaj renkontigoj, ni ripetas, ke la celo de niaj renkontigoj estas:

- utila ekkono de vizitataj lokoj,
- interkonatigo de partoprenantoj,
- amikiĝo kaj praktika eluzo de la lingvo ESPERANTO.

Nia devizo estas: PER ESPERANTO AL AMIKECO, PER AMIKECO AL LA MONDPACO !

(A.Klementová)

RESPONDO AL ALVOKO

Ni,

partoprenantoj de la 10-a TURISMA RENKONTIĜO DE ERCMONTARAJ ESPERANTISTOJ, kiu okazas ĉiujare, alterne - foje en ĉeĥa, foje en germana flanko de Ercmontaro, nunjare, ni

volas esprimi nian kontraŭstaron al militarismo de la kosmo, al danĝero de nuklea milito kaj al evoluigado de amasdetruigaj armiloj, kiuj daŭre minacas ekzistadon de la homaro.

Ni, esperantistoj,

bone scias, ke ekzistas eblecoj kunlabori kaj efektiviĝi pli facilan interkompreniĝon de la homaro en la tuta mondo kaj al tio ni estas pretaj utiligi internacian lingvon ESPERANTO en porpaca laboro.

Se la homoj pli bone komprenos al si reciproke,

ili pli facile povos amikiĝi -

se multaj homoj ligos amikajn kontaktojn,

pli facile ili povos kunlabori en porpaca agado kaj

tiamaniere forigi malamikajn rilatojn,

tial ili povos ankaŭ plifirmigi pacajn fortojn en la tuta mondo,

ĉar ĉiuj homoj rajtas vivi en la paco!

Pro tio ni responde al alvoko de partoprenantoj de la 5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, okazinta en Olomouc la 11-an ĝis 13-an de septembro 1987

a n o n c a s
n i a n v i d p u n k t o n .

La 25-an ĝis 27-an de septembro 1987

Partoprenantoj el tri landoj (ĈSSR, GDR, PPR), kiuj kunvenis en subercmontara civito RADOŠOV en distrikto Karlovy Vary en Ĉeĥoslovakio

O P A V A

La Memordomo de P. Bezruč (Památník Petra Bezruče) en Opava preparis por aŭtuno 1987 ekspozicion "Tutmonda resonado de la verkaro de P. Bezruč". La ekspozicio helpe de diversaj libroj, ĵurnaloj kaj korespondadoj montris, kian intereson vekis la poemoj de

Bezruč en multaj landoj de la mondo - ja li estas la plej ofte tradukata poeto de la ĉeĥa literaturo. Multloke oni ĉi tie parolas pri Esperanto kaj ĝia rolo en disvastigado de la ĉefverko de P. Bezruč "Sileziaj Kantoj" en tridekon da lingvoj. Krom la Esperanta eldono de tiu ĉi poemaro estis prezentitaj tradukoj en pluraj lingvoj, kiujn peris Esperanto, ekz. la ĉina. En la ekspozicio estis uzitaj ankaŭ grandformataj Esperantaj tradukoj el Bezruč. Ĉe la inauguro oni parolis ankaŭ pri grava rolo de Esperanto kaj la germana lingvo en la diskonigo de la verko de la nacia artisto.

(Vl.Ko.)

En la tagoj de la 13-a ĝis la 19-a de septembro 1987 okazis en Opava la 30-a kultura festivalo-semajno "Bezručova Opava", dediĉita al la 120-a datreveno de naskiĝo de nacia artisto Petr Bezruč. Ĉe tiu okazo estis alte aprezita aktivado de la estro de la loka Esperanto-rondeto kaj vicprezidanto de nia asocio s-ano ing. Vlastimil Kočvara, kiu ricevis la urban ordenon "Por meritoj pri la urbo Opava". En la koncerna proklamanonco estas skribite, ke li modele uzas Esperanton por propagandi la urbon kaj ĝian grandan naskiton P. Bezruč, krom alie helpe de Esperantistaj Kulturaj Festivaloj, kiuj jam 5-foje okazis en Opava. Pro tiu fakto s-ano Vl. Kočvara ankaŭ estas membro de la organiza komitato de la festivalo "Bezručova Opava".

Jen sekvinde ekzemplo, ĉar ne multofte oficialaj instancoj en nia lando taksas publike laboron de esperantistoj faritan pere de la internacia lingvo.

Al s-ano ing. Vl. Kočvara ni sincere gratulas!



Jen tiel festis la centjarigon de Esperanto membroj de la Esperanto-rondeto en Opava. Kune kun siaj familianoj ili travivis agrablan ĉefjran vesperon, dum kiu sonis Esperantaj kantoj kaj rememoroj je travivaĵoj el Esperantujo. Ne mankis ankaŭ vino kaj bongustaĵoj. Kaj estis ankaŭ pridiskutita preparata jubilea ekspozicio... Ja ankaŭ tio apartenas al la vivo de fidelaj "ĝisostaj" esperantistoj.

(Vl.Ko.)

Digna Omgao en Prago

Kvankam ankoraŭ plena de impresoj de belo, mankas al mi esprimoj por trafte priskribi la ĝojigan etoson, kreitan de niaj karaj artistoj, kiuj per sia altnivela arto glorigis la 23-an de septembro niajn du jubileojn: Centjarigon de Esperanto kaj la 85-an datrevenon de nia praga E-klubo. Estas granda honoro por ni, ke kantistoj de nia plejanta operhoro - de Nacia Teatro - klopode ellernis ariojn kaj kantojn Esperante ne nur profesie perfekte. Evidentigis, ke ili kantas kun granda simpatio al nia belsona lingvo zorge kaj eminente elkantata. Nia granda danko apartenas al gekantistoj Dalibor kaj Sonja Janotovi, Lidia Greinerová, Luda Dvořáková, Karel kaj Jindřiška Zemanovi. Pleje ni dankas al nia membro Josef Vích, kantisto de Nacia Teatro, kiu sindone, zorgeme ĉion aranĝinte ekmalŝanis kaj eĉ ne povis partopreni kaj ĝui la sukceson de sia laboro.

La klasika Zamenhofs Esperanto aŭdigis danke al prezento fare de nia Eva Seemannová tiaperfekte, ke eĉ gastoj neesperantistaj senspire ĝuis la belsonecon de monologo de Ifigenio sur Taurido de J. W. Goethe. La violoncela ludo de muziko de Dvořák fare de nia estimata membro prof. Sádlo-Páv superŝutis nin per sonoj jen teneregaj jen stormaj, ĉar la artisto sciis al ni interpreti mesaĝon de la fama komponisto. Tra la tuta programo gvidis nin lerte sinjorino Libuše Erbová. La lukasa salonego de "Savarin" estis plena de gastoj kaj senfinaj estis la aplaŭdoj. Granda estis la ĝuo de la aŭskultantaro kaj daŭra restos la dankemo de la klubanoj al ĉiuj, kiuj meritis pri la digna omago de niaj jubileoj.

(H.Štr.)

Z N O J M O

Okaze de la jubilea jaro la klubo aranĝis grandan ekspozicion en salonego de Kulturdomo. Slogano de la ekspozicio estis: "Per Esperanto por la komprenigo inter nacioj". Sur 17 paneloj estis preskaŭ mil bildkartoj el 40 landoj, ankaŭ informoj pri la movado, gazetoj, libroj. La klubo krome eldonis bildkarton de Znojmo kun la teksto: 100 jaroj de Esperanto. La ekspozicion vizitis 1100 homoj, do plena sukceso. - La 7. 9. komencigis la kurso por komencantoj kaj progresintoj, entute 35 personoj. Instruas V. Rotrekl. - En baza lernejo s-ano Machovcová gvidas kurson por 16 infanoj.

(V.Rotrekl)

Art-literatura sekcio

Literatura vespero kun Jarmila Urbánková

Literatura sekcio de ĈEA aranĝis la 14-an de oktobro 1987 literaturan renkontiĝon kun merita artistino JARMILA URBÁNKOVÁ, ĉeĥa poetino, en Radiopalác, Vinohrady, Prago 2. Enkonduke J. Karen prezentis al preskaŭ neesperantista publiko la signifon de Esperanto en ĝia 100-jara evoluo, akcentis ĝian rolon por la kulturo tutmonda kaj nacia. La aktoro Fr. Skřípek tre senteme prezentis la poezion de Jarmila Urbánková. J. Rumler kaj J. Karen konvinke montris, ke la traduko de la poemoj vere kaj fidele koincidas kun la originalo. Atestis tion la aŭtorino mem. Ĉefe placis al ŝi la eŭfonio de Esperanto. La samon atestis la recitanto.

En tre interesa diskuto kun la aŭtorino J. Rumler prezentis (kaj la aŭtorino mem) sian vivon, momentojn gravajn por ŝia inspiro, oni analizis sian verkon kaj ĝian signifon por la legantoj kaj por la tuta nia socio. Tre simpatiis la modesteco de la aŭtorino. La legantoj proklamis sian poezion klara, komprenebla, home valora kaj proksima al ni ĉiuj. Vere bela vespero, kiu konvinke montris, ke renkontiĝoj kun niaj verkistoj estas valoraj reciproke: por ni ilia verko kaj por ili la konvinko, ke Esperanto estas grava instrumento por intersango de kulturaj valoroj inter nacioj, ke esperantistoj estas kulturaj homoj.

(J.Karen)

100-jara jubileo de Esperanto kaj de naskiĝo de fratoj Čapek

Literatura sekcio de ĈEA eldonis kiel literaturan suplementon al PACO, jaro 1987, broŝuron en 3000 ekzempleroj, paĝoj 32, prezo 5,- Kčs, titolitan: KAREL ČAPEK - unu el reprezentantoj de la ĉeĥa literaturo. La esperantistoj estas petataj dissendi tiun libreton al E-revuo kaj eldonejoj kaj organizaĵoj, ĉefe al verkistoj por atenti ĝi ilin pri ekzisto de tiu vere valora verkisto kaj ankaŭ klarigi al E-publiko tutmonda, ke J. Vondroušek tradukis grandan parton de lia verkaro esperanten, do klarigi la fakton, ke ĉiuj povus ĝui la verkon por pligrandigo de sia spirita horizonto.

Se esperantistoj demandus eldonon de Ĉapek-verkoj en Esperanto ĉe niaj ĉeĥaj eldonejoj, estus tio certe manifesto de la nova pensmaniero de niaj eldonejoj uzi nian lingvon por famigi la ĉeĥan autoron mondscale.

La publikaĵoj preparis kunlabore kun Societo de fratoj Ĉapek enhave J. Karen. Elektion de fragmentoj el la verkaro kaj tradukon merite faris s. Josef Vondroušek. Krom la portreto de Karel Ĉapek la publikaĵo enhavas tre valoran eseon de d-ro J. Opelik, kandidato de la sciencoj, pri signifo de liaj verkoj kaj lia personeco. D-ro Fr. Buriánek, doktoro de la sciencoj, skizis biografion kaj bibliografion de ĉiuj verkoj en kronologia ordo. Ĉiu grava verko estas analize prezentita laŭ enhavo kaj signifo al la legantoj. La fragmentoj el Ĉapek-verkaro vivigis la enhavon de la libreto, ĝi fariĝis interesa antologieto, kiu legindas pro sia enhavo. La legantoj informigos pri jam eldonitaj kaj ĝis nun ne eldonitaj verkoj far Karel Ĉapek kaj ankaŭ konatiĝos kun la eĥo de la Esperanta gazetaro rilate al verkoj de Karel Ĉapek. Ne forgesu mendi la broŝuron kaj uzi ĝin kiel pagilon kontraŭ aliaj libroj eldonitaj en Esperanto.

J. Karen

Ĉeĥoslovaka kulturo en Hungario

Subbaze de peto far Hungara Esperanto-Asocio realigis la 26-an de oktobro 1987 Ĉs. kultura kaj informa centro en Budapeŝto literaturan vesperon pri ĉeĥaj kaj slovakaĵaj verkoj tradukitaj en Esperanton.

Administro de eksterlandaj kulturaj aranĝoj de la federacia ministerio por eksterlandaj aferoj en Prago delegis al ĉi tiu vespero s-anojn J. Vondroušek kaj J. Karen, kiu estis gasto de budapeŝtaj esperantistoj, kaj komune okazis tre sukcesa vespero, ligita kun ekspozicieto de Ĉs. literaturo en Esperanto, kun ekzegezo kaj recitado. La unua parolis O. Knichal.

La solenan vesperon inauguris D-ro J. Musílek, CSc., ambasadora konsilisto kaj direktoro de Ĉeĥoslovaka kultura kaj informa centro.

La saloneto estis plenplena de invititaj gastoj, kaj la aranĝo treege sukcesa.

Josef Vondroušek

Hádanka a křížovka

(la ĉeĥa enigmo-revuo) enpresis en sia 15-a n-ro 1987 krucvortenigmon kun bela akompana teksto, kiuj ambau kun klarigoj por solvado okupis preskaŭ tutan paĝon A4. En la sama n-ro aperis krucvortenigmo pri SET Iančov sur triono de paĝo. A.St.

Scienc-teknika konferenco 1988

Fervoja Esplorinstituto kunlabore kun Domo de Tekniko ĉe Ĉeĥoslovaka scienc-teknika asocio Prago aranĝos dum tagoj 1988-10-04/06 en urbo Pardubice konferencon, kies temo estos "SCIENCOTEKNIKA EVOLUO EN FERVOJA TRAFIKO" direktite al progresivaj elementoj de fervoja tekniko kaj ilia provado.

Enkadre de la konferenco partoprenantoj ekskursos al Fervoja provrondo de la Instituto, apartenanta al unika fervoja provcentro.

Kiel laborlingvoj dum la konferenco funkcios la ĉeĥa, la rusa, la germana. Por subteni la rezolucion de UNESCO XI.4.4.218 el novembro 1985 pri Esperanto alvokanta membrajn ŝtatojn elprovi ĝin en praktikaj aplikoj, ankaŭ Esperanto estas prove plua laborlingvo, sub kondiĉo, ke aligos almenaŭ 5 eksterlandaj partoprenantoj kun kontribuaĵoj havantaj kaj fake kaj lingve bonan nivelon.

Pluajn informojn vi ricevos je la adreso: Fervoja Esplorinstituto, U Lužického semináře 3, CS-118 57 Praha 1. Al tiu adreso bonvolu sendi ankaŭ antaŭaligilon kun konciza enhavo de via prelego. Espereble vi informos pri la konferenco ankaŭ pluajn al vi konatajn fakulojn.

KONVERSACIO por progresintoj



Dekdua temo: V E S T A D O

Nokte la homo dormas kaj kuŝas sur la lito, divano aŭ kaŭĉo. En la litoj estas pajlosakoj aŭ matracoj. Sub ili estas tabuloj aŭ drat-hamako. Antaŭ la dormado oni metas unue litotukon, poste oni ekkusas kaj kovras sin per kuseno aŭ litkovrilo. Sub la kapo estas kapkuseno. En la kusenoj estas plumaro, lanugo aŭ molaj artefaritaj materialoj plastikaj. En arestejoj estas nuraj kuŝbretoj, la arestatoj havas nur malpezajn kovrotukojn.

La dormanta homo havas sur si noktan subveston. Piĵamo konsistas el pantalone kaj jaketo, nokta ĉemizo estas ĝis piedoj. Kiam oni leviĝas kaj ordigas la liton, oni survestas tagan subveston post lavado. Oni lavas sin en lavpelvo, en bankuvo aŭ sub duŝo aŭ pluvbano. La taga subvesto estas kalsono kaj ĉemizo. La virinoj bezonas ankoraŭ mamzonon, iam ili vestas kombintolaĵon aŭ subjupon. Se oni havas sur si nur subveston, oni estas en negliĝo. Ĉar la subvesto estis plej multe el tolo, ĝi estas tolaĵo, eĉ se nun ĝi estas ankaŭ el aliaj materialoj. Sur la subveston vestas viroj pantalonon kaj jakon, sub ĝi estas iam veŝto. La virinoj vestas jupejn anstataŭ pantalonon. Tia vestaĵo taŭgas por printempo aŭ aŭtuno, somere oni vestas sin malpli peze, viroj havas nek jakojn nek veŝtojn, virinoj havas bluzojn aŭ kiteletojn. Alikaze taŭgas trikvetoj aŭ ĵerzoj. Pro malsano, sed ankaŭ pro bela talio oni portas korsajojn aŭ talivestojn. Virina vesto en unu tuto estas robo. La virinaj vestoj estas pli multkoloraj kaj pli diversaj ol moderaĵ vestoj de viroj. La roboj havas dekoltojn. Nuntempe eĉ virinoj portas pantalonojn. Bele vestita homo lau la modo plaĉas al aliaj.

Vintre oni surmetas ankoraŭ mantelon, por pluvo redingoton, por frosto pelton. Ĉirkaŭ la kolo oni ligas ŝalon. Por manoj estas gantoj aŭ mufoj, tiujn uzas precipe virinoj. Vintre estas pli multe portataj kapkovriloj. Pli simplaj estas ĉapo, pli elegantaj ĉapejoj. Kufoj ŝirmas ankaŭ orelojn. En kelkaj profesioj estas sur kapoj biretoj. Kasko estas kapŝirmilo por fajrobrigadanoj, ministoj kaj soldatoj. Kaskedo ŝirmas komplete la kapon kaj lasas nur malgrandan malfermaĵon por okuloj.

Sur piedoj estas ŝuoj aŭ pli altaj botoj, se estas koto, do sur ili estas ankaŭ galoŝoj. Oni metas ilin malofte sur nudan piedon, unue estas ŝtrumpoj, kiuj kovras la tutan gambon, aŭ nur duonŝtrumpoj, soldatoj uzas ankoraŭ piedtukojn. La piedvestaĵo havas laĉojn, kiujn oni ligas, aŭ bukojn aŭ butonojn. Plandumoj kaj kalkanumoj, kiuj tuŝas la teron aŭ plankon, estas speciale solidaj. Ŝtrumpojn tenas la guma krurzono aŭ tenilo kun buko. Hejme oni portas lanskulojn aŭ pantoflojn, dum varma vetero simplajn sandalojn.

Por solenoj vestas la viroj frakojn aŭ smokingojn, la virinoj longajn robojn kaj vilaganoj naciajn kostumojn. La uniformo estas vestaĵo de la sama fasono kaj koloro por kelkaj profesioj. Kombinezo estas vestaĵo, kiu ŝirmas la korpon kontraŭ damaĝa kaj malagrabra haladzo, radiado aŭ medio. Skafandro estas por subakvigistoj kaj kosmonaŭtoj.

Al la bona vestaĵo apartenas pluraj galanteriaĵoj. Kravaton ligas plej ofte viroj ĉirkaŭ la kolumo, naztuko estas portata en poŝo aŭ mansako. Pluraj vestoj havas butonojn, ie estas zipoj. Ekstremaĵoj de jakoj kaj manteloj estas baskoj. Sur vestoj estas multaj faldoj, sur la jakfaldado de jakoj aŭ mantelo estas portataj insignoj. Selko aŭ rimeno tenas la pantalonon. Manikoj estas partoj de vestaĵoj, kien oni puŝas brakojn. Aliaj vestaĵoj havas subŝtofojn kaj ŝtopplenaĵojn. Sur kolumoj estas kroĉbantoj, por ke oni povu pendigi vestaĵojn sur vesthokoj. Gamboj estas en tuboj. La tuboj de pantalonoj devas havi rektajn eĝojn. Por bone vesti pantalonon estas inter tuboj fendo, kiun oni fermas kaj malfermas. En ŝrankoj pendas vestaĵoj sur vestportiloj.

La materialo por pretigado de vestoj devenas el fadenoj, kiujn oni ŝpinis. Por ŝpinado estas uzataj fibroj el lano de ŝafoj, el kotono, kiu kreskas sur arboj, el lino kaj kanabo, kiuj kreskas sur kampoj. Nuntempe ekzistas fadenoj artefaritaj, ankaŭ vitro povas esti transformita en fadenojn. Unu speco de raŭpo prezentas ankaŭ fibrojn por silko. El ŝpinaĵoj oni poste teksas. Teksaĵoj estas diverse nomataj laŭ la origino, dikeco kaj celo. Drapo estas dika teksaĵo, plej ofte el lano. Ŝtofo estas malpli dika, tolo ankoraŭ malpli dika. Tiuj estas el kotono, lino aŭ kanabo. Silko kaj multaj sintezaj teksaĵoj diverse nomataj estas malplej dikaj. Tuko estas peco de teksaĵo por certa celo. El teksaĵoj kaj aliaj materialoj oni poste kudras vestojn. Sed nun estas eĉ aliaj teknikoj, tial ne estas nur kudristoj, sed eĉ tajloroj. El fadenoj oni povas ankaŭ triki kaj kroĉeti. Oni faras kunigitajn maŝojn. Se oni ornamas teksaĵojn per kudrero, oni brodas. Speciala brodado estas spindelpilektado de punktoj. Aliajn vestaĵojn oni kungluas. Flikado estas rebonigado de uzdifektitaj vestaĵoj aŭ ŝuoj. La produktado de vestaĵoj estas farata laŭ mendo, en kiu oni mezuras la talion, por ke la vestaĵo estu ĝustmezura. Konfekcio fabrikas pli grandajn kvantojn de vestaĵoj, kiujn oni en vendejo adaptas laŭ la staturo.

Por sporto kaj banado oni bezonas specialan vestaĵon. Tiu similas al subvesto, ekzemple bankalsono, sportkalsono, bankostumo, tial oni portas ĝin publike malofte, oni metas ian surtuton.

Vestaĵojn oni gladas, brospurigas kaj ŝirmas kontraŭ tinoj. Tolaĵojn oni lavas, premtordas aŭ vringas kaj sekigas. Aliaj teksaĵoj postulas alian manipulado, oni devas bone legi la instrukcion. La vestaĵo estas proponata laŭ la modo, oni elpensas novajn fasonojn, kolorojn kaj ceterajn eksteraĵojn. Al la vestado apartenas ankoraŭ pluvombreloj, sunombreloj, bastonoj, tekoj, mansaketoj, pudrujoj, horloĝoj kaj juveloj. Sur fingroj estas ringoj, sur la kolo ĉenoj, la virinoj ĉirkaŭvolvas skarpajn, en siaj haroj havas bantojn kaj portas bukedojn en manoj.

GRAMATIKO:

1. Nomu ekzemplojn de la sufikso -umo en kazo de vestado. Ĉu vi scias klarigi: nazumo, kolumo, manumo, butonumi? Klarigu kaj diru aliajn ekzemplojn

2. Trovu dek substantivojn kun sufikso -aĵo kaj diru ilin en aliaj frazoj

3. Trovu dek substantivojn, kiuj signifas vestaĵojn aŭ partojn, uzu ilin adjektive. Ekzemple: /trovite/ maniko, /tasko/ la manika ŝtofo estas alia

STILO:

1. Rakontu, kiel vi vestas vin matene

2. Skribu dialogon inter tajloro kaj kliento

3. Traduku mallongan tekston el primoda revuo

DEMANDOJ:

1. Kiajn kolorojn havas la vestaĵoj? Kies vestaĵoj estas pli multkoloraj? Kial oni rekomendas koloran vestaĵon?

2. Kiujn vestaĵojn vi gladas? Kiel oni gladas pantalonon?

3. El kiuj materialoj estas viaj unuopaj vestopartoj?

4. Kiujn nomojn de artefaritaj ŝpinaĵoj kaj teksaĵoj vi konas?

5. Kia estas la nuntempa modo en vestado?

(Josef Chvosta)

Miroslav Malovec:

ĈAPITROJ el INTERLINGVISTIKO

1. Descartes

En la jaro 1629 venis en la manojn de la franca pastro Marsenne, kiu kontaktis kun famaj sciencistoj de sia epoko, presita flugfolio de anonima aŭtoro, kiu postulis krei universalan lingvon. Marsenne sendis la flugfolion al la granda franca filozofo René Descartes /1596-1650/, kiu tiutempe vivis en Nederlando. La respondo de Descartes, datita la 20-an de novembro 1629, farigis la teoria programo de la lingva planado. Ĝi montras la fundamentajn direktojn de laboroj en ĉi tiu sfero.

En la letero de Descartes estas skizitaj du vojoj al formigo de la universala lingvo. Descartes konsentas kun la aŭtoro de la flugfolio, ke por uzado de la universala lingvo sufiĉas nur malgranda vortareto. Descartes klarigas, ke tio eblus en la kazo, se en la universala lingvo estus "nur unu maniero de konjugacio, deklinacio kaj vortfarado, tute mankus nekompletaj kaj neregulaj formoj, kiuj estiĝas pro deformita elparolo, ... fleksiado de substantivoj, adjektivoj, verboj kaj farado de novaj vortoj realigis per afiksoj kaj finaĵoj ..., kiuj estus klarigitaj en la vortaro" komune kun la radikvortoj. "La simplaj homoj lernus kun helpo de tiu vortareto

dum ses horoj esprimiĝi en ĉi tiu lingvo."

En ĉi tiuj vortoj estas esprimita la ideo liberigi la lingvon de neregulaĵoj kaj devioj, de ĉiuj ajn specoj de esceptoj kiel en la vortfarado, tiel en la morfologio. Dank' al tio ĉiu vorto estus facile rekonebla en tekstoj kaj eksplikebla en la vortaro. Ĉi tiun vojon iros pli poste la aŭtoroj de tiaj lingvoprojektoj kiel Volapuko kaj Esperanto.

Tamen Descartes ne kontentigas kaj prezentas alian, multe pli radikalan proponon, kiu fine aperas kiel nerealegebla, sed malgraŭ tio servas kiel baza teoria instigo al disvolvado de la lingvoplanado en la epoko de Descartes.

Descartes opiniis, ke eblas ordigi ne sole la nomojn de nocioj, sed ankaŭ la nociojn mem; necesas trovi manieron de amasigo de nocioj en limigitan kolekton de elir-ideoj, simile kiel ni scias esprimi ĉiun ajn nombron per dek ciferoj. "Precize tiel, kiel eblas en ĉiu ajn nekonata lingvo dum unu tago ellerni elparolon kaj skribadon de ĉiuj ajn nombroj ĝis la senfineco, kvankam per si mem ili prezentas senfinan kvanton da diversaj vortoj, necesas lerni fari la samon per ĉiuj ceteraj vortoj, neeviteblaj por esprimi tion, kion povas krei la homa intelekto."

Per ĉi tiuj vortoj estis starigita la grandioza programo de rekonstruo de la homa lingvo ne nur kiel de rimedo de komunikado, sed unuavice kiel de rimedo de pensado. La artefarita lingvo estas por Descartes "io kiel ŝlosilo de homaj imagoj", helpe de kiu eblas "per kelkaj reguloj de konkludado per pure formala vojo akiri novan konon, kies vereco estus anticipe garantiita pro la filozofia karaktero de la lingvo."

Efektive, Descartes starigis taskon konstrui lingvon, kiu estus ne nur "tre facila por lerni, prononci kaj skribi, sed antaŭ ĉio, kiu helpus al konkludoj ... por ke estu preskaŭ neeble erari ... kaj kun kies helpo eĉ kampuloj kapablus ĵuĝi la esencon de la aferoj pli bone, ol kapablas nun la filozofoj."

Por plenumi tiel larĝan programon devas kontribui responda scienca disciplino. "Invento de tia lingvo dependas de la verdira Filozofio, ĉar alie ne eblas nombri ĉiujn ideojn de la homoj kaj ordigi ilin," deklaras Descartes.

En ĉi tiu koncepto la artefarita lingvo kaj la scienco pri la artefarita lingvo ricevas eksterordinare altan taskon: la artefarita lingvo estas intencata kiel lingvo filozofia, enkondukanta ordon en la homajn imagojn kaj per tio ŝanĝanta la pensadon, kaj la responda scienco estas komparata al "verdira Filozofio" /kun majusklo/, t.e. ĝi prezentigas kiel metascienco, kiu staras super ĉiuj ceteraj sferoj de la homaj scioj.

Ĉi-rilate la sorto de la lingvoplanado en la tempo de Descartes similas al la sorto de la lingvoscienco ĝenerale: la lingvoscienco kaj la lingvoplanado estis tiutempe firme ligitaj kun la logiko kaj filozofio, kaj ne ĉiam ili diferencigas la objekton de sia esplorado disde tiu, kiun esploras la logiko kaj la filozofio. La plua historio de la lingvoplanado, same kiel historio de la lingvoscienco, prezentas procedon de liberigado de ĉi tiu logika-filozo-

fia komplekso, kvankam la evoluo en la sfero de scienco pri la artefaritaj lingvoj konsiderinde malfruigis kompare kun aliaj lingvistikaj disciplinoj, kiuj okupiĝis per lingvoj naturaj.

/Laŭ S.N.Kuznecov: Fundamentoj de interlingvistiko/

2. K o m e n i o

La dua plej signifa teoriisto de la lingvoplanado post Descartes estis lia samtempulo kaj nia naciato, granda ĉeĥa pedagogo kaj filozofo, Jan Amos Komenský /1592-1670/, internacie konata kiel Comenius, Komenio. Dum sia tuta vivo li okupiĝis pri programo ankoraŭ pli grandioza ol tiu de Descartes, nome pri reeduko kaj unuigo de la homaro. Kaj ĝuste la kreo de artefarita lingvo, per kiu la tuta homaro povus interkompreniĝi kaj pli perfekte pensi, estis unu el la ŝlosilaj punktoj de lia programo.

Siajn meditojn li detale prilaboris dum sia restado en Anglio en la jaroj 1641/1642, en la latinlingva libro Vojo de lumo, kaj post du jaroj li revenis al la temo en Svedio, en verko tralaborita ankoraŭ pli detale, en la Ĝenerala Konsultoj pri la Rebonigo de la Homaj Aferoj. Al la universala lingvo dediĉas la unua libro la 19-an ĉapitron, la dua libro eĉ la tutan kvinan parton nomatan Panglottia.

Komenio konsciis: se la lumo de klereco estu disvastigata inter la popoloj, la instruantoj, portantoj de la lumo, devas antaŭ ĉio interkompreniĝi kun la popoloj. Kaj "ĉar estas pli facile, ke ĉiuj lernu unu kroman lingvon ol unuopulo ĉion", li vidis unu solan vojon en la komuna lingvo. "Ĉar per ĝi ĉiuj komprenus sin reciproke pli bone, uzante la samajn vortojn, kaj tio estos eĉ unuarigarde klara signo, ke tiu ĉi universala lumo trapenetris al ĉiuj; klopodoj pri klerigo pli firme ankros ĉe ĉiuj kaj pli sekure disvastiĝos al la posteuloj. Kaj iu, kiu volos, povos vojaĝi tra iuj ajn regionoj kaj mondpartoj kaj komprenos ĉiujn kaj ĉiuj komprenos lin."

En la epoko de Komenio dominis la latino, kiun li majstre regis, sed ĝuste pro tio li konis ĝiajn malavantaĝojn kaj rifuzadis ĝin kiel universalan lingvon. "Unue, per universala lingvo oni devas helpi al ĉiuj egalrajte; per la latina lingvo ni helpus plej multe al ni, kiuj ĝin jam regas, ne ankaŭ al malkleraj nacioj, kiujn ni devas ĉi tie preferi konsideri, ĉar ili signifas la pli grandan parton de la mondo. Por ili la latina lingvo estas, same kiel la aliaj lingvoj, aŭ eĉ pli, kaj nekonata, kaj malfacila ... Ĉar ĝi estas plena je diversaj kazoj de nomoj, tempoj kaj manieroj de verboj, konstruoj en sintakso kaj en ĉio ĉi abundas je plej nombraj malregulaĵoj ... Due, la universala lingvo devas esti al ĉiuj la plej riĉa, ĉiufanke kontentiga, por ke ĝi taŭge sencotrafu ĉiujn aferojn kaj facile esprimu ĉiujn imagojn de la menso. Ke tia ne estas la latina lingvo, tion ĝi konfesas mem, ĉar ĝi estas malriĉa je kunmetaĵoj kaj ne tre fekunda rilate al derivaĵoj. Tial ĝi pruntas tiom da vortoj de ekstere, precipe el la greka, de kiu ĝi tute dependas kaj sen kiu ĝi ne atingas perfektecon. Kaj tiel forlasante unuecon kaj simplecon kaj ne atingante perfektecon, kian ni serĉas, ĝi sufiĉas nek al si, nek al objektoj."

Komenio rifuzadis ankaŭ ceterajn naturajn lingvojn en la rolo de la lingvo universala. "Ankaŭ neniu el la vivantaj lingvoj, eĉ la plej kulturitaj, taŭgas, ĉar al neniu el ili mankus laŭdantoj, kaj ĉiu nacio fierus per sia Helena, tial ni ne povus avanci sen envio, disputoj kaj novaj konfuzoj ... La itala, la hispana kaj la franca estas torentoj el la lingvo latina, multigata ne per novaj fontoj, sed per truoj. La francan lingvon rekomendas ĝia lerteco kaj agrableco, sed ne eblas elekti ĝin kiel peranton de saĝeco, ĉar ĝi ne staras sur propraj radikoj. ... La angla estas konsiderata kiel ankoraŭ pli facila, sed ĝi taŭgas por ni ankoraŭ malpli - ĉar ĝi estas ankoraŭ pli granda galimatio."

Komenio opiniis la plej grava kvalito de la universala lingvo la ordigon de nocioj, do la nerealigeblan idealon, kiun esprimis antaŭ li jam Descartes. Ĉar ĉiuj naciaj lingvoj plenas je sinonimoj, homonimoj, frazoj, parolturnoj kaj aliaj superfluaĵoj kaj konfuzoj, povis konveni al Komenio neniu natura lingvo. Tial li venis al logika konkludo, ke "ne restas pli efika rimedo ol konstrui novan lingvon, kiu superos ĉiujn jam konatajn lingvojn, estante pli facila, por ke ni povu lerni ĝin sen perdoj tempaj kaj materiaj, pli ĉarma-sona, por ke estu ĝojo lerni kaj ellerni ĝin, pli perfekta, por ke scii ĝin estu utile al kompreno de la aferoj mem."


Ĝi devas esti lingvo racia, celkonscia planita, analogia, regula, harmonia, kiu ne toleras malakordojn inter la aferoj kaj nocioj. Kiom da aferoj ekzistas, tiom da nocioj devas esti, nek pli, nek malpli. Ĉiu diferenco inter aferoj devas esti esprimita per diferenca vorto. Al simpla afero respondu simpla vorto, al kunmetita afero kunmetita vorto. Unu litero havu ĉiam sian propran, la saman sonon. El la unuopaj naciaj lingvoj necesas transpreni iliajn avantaĝojn. La germana estas modelo por vortkunmetado, la latino povas doni agrablan prononcon, la angla naturan genron de substantivoj ktp.

La rajton de homo krei artefaritan lingvon opinias la granda pedagogo memkomprena. "Eble estas neniu, kiu komencus dubi, ke estas permesite krei novan lingvon. Se tamen en iu estigus tia ideo, mi respondos, ke ĝi estas permesita ... Kaj se Adamo, filozofoj, metiistoj kaj ĉiuj homoj rajtis ĝis nun krei nomojn por unuopaj aferoj, kial ili ne rajtus krei ankaŭ verbojn, konjunkciojn kaj la ceterajn komponentojn, kiuj apartenas al la tutaĵo? Kaj se tiom da lingvoj estiĝis per hazardo, kial almenaŭ unu ne povus formiĝi laŭ racia plano kaj nobla rekonstruo? Kial ni lasu ĉion al hazardo? Kial ni ne konduku ion sur la vojon de saĝo? Kaj se estas permesite korekti la nociojn laŭ la aferoj mem, kial ne estus permesite adapti la lingvon, por ke la korektitaj nocioj estu esprimataj pli ĝuste?"

Komenio demonstris siajn ideojn per du nekompletaj projektoj. Unu utiligas simpligitan latinan vortmaterialon, ekzemple el "esse" /esti/ li prenis la radikon "es" kaj konjunkciais: eges /mi estas/, tues /ci estas/, iiles /li estas/, moses /ni estas/, voses /vi estas/, illies /ili estas/. La alia projekto konsistis el tute elpensitaj vortoj. Ekzemple "ban" /esti/ oni konjugacias: bana, bane, bani, baná, bané, baní. En la preterito ricevas verboj la prefikson pa- /pabana, pabane .../, en la futuro la prefikson fa- /fabana, fabane .../. La pronomo "o" /=mi/ estas deklinaciata: oi /de mi/, oe /al mi/, oa /min/, oo /pri mi/. La pluralo ricevis la finaĵon

-n /on = ni/ kun la sama deklinacio /oni, one, ona, ono/. Simile li traktis la substantivojn. Ekzemple "el" /dio/ havis formojn "el, eli, ele, ela, elo", en la pluralo "elon, eloni, elone, elona, elono". En la ina genro "ela" /diino/ aperas formoj "ela, elai, elae, elaa, elao - elan, elani, elane, elana, elano".

/Laŭ O. Kníchal: Komenio kaj la internacia lingvo/



Korespondi kun eksterlandanoj en Esperanto deziras 62-jara viro, akrigisto de metaloj. Li kolektas postmarkojn kaj bildkartojn, solvas krucvortenigmojn kaj ludas ŝakon. Lia adreso: Mieczysław Jędrzychowski, PL-59-400 JAWOR, str. Poniatowskiego 33, Pollando.

Kun ĝeŝo aŭ slovako volas korespondi Adam Wilczewski, ul. Grodzińska 50, 16 010 WASILKÓW, Pollando. Li interesiĝas pri muzike (punk, hardcore), lingvoj, turismo kaj reciprokaj vizitoj.

34-jara inĝenierino tre dezirus korespondi kun geesperantistoj en nia lando. Ŝi interesiĝas pri turismo, muziko, literaturo, bona kuirado, reciprokaj vizitoj. Adreso: Ewa Głanowska, ul. Orzeźna 48, 57-500 BYSTRZYCA KŁODZKA, Pollando.

42-jara instruisto interesiĝas pri turismo, folkloro, kolektas bildkartojn. Adreso: Józef Śniady, 72-004 TANÓW, str. Szczecińska 2, Pollando.

55-jara oficistino interesiĝas pri turismo. Adreso: Stanisława Naruk, 80-765 GDAŃSK, str. Elbląska 22/12, Pollando.

22-jara esperantistino korespondus pri ĉiuj temoj tutmonde: Jolanta Grochla, ul. Powst. Warszawskich 80, PL-42-680 TARNOWSKIE GÓRY 8, Pollando.

27-jara kuracistino interesiĝas pri turismo, vojaĝoj, trikaĵoj, modoj. Adreso: Ewa Trojanowska, Os. M. Fornalskiej 9m5, PL-67-600 LIPNO, Pollando.

34-jara teknikisto interesiĝas pri turismo, literaturo kaj lernado de eksterlandaj lingvoj. Li kolektas eksterlandajn lernolibretojn pri lingvoj kaj malnovajn Esperantajn revuojn. Adreso: Krzysztof Dusik, ul. Goszczyńskiego 22A PL-34-500 ZAKOPANE, Pollando.

29-jara instruisto en elementa lernejo interesiĝas pri Esperanto, filatelo kaj ŝako, kolektas bildkartojn. Adreso: Jacek Malanowski, Zastrużne, PL-11-533 DĄBRÓWKA k/PISZA, Pollando.

Oficisto interesiĝas pri sporto, filmo, kolektas bildkartojn, gazetojn (pri sporto, filmo, modo). Adreso: Władysław Działak, ul. Arm. Czerwonej 160m55 25-324 KIELCE, Pollando.

Lernantinoj volas korespondi kaj interŝangi bildkartojn: Barbara Prażych (10-jara) kaj Magdalena Prażych (11-jara), 15-207 BIALISTOKO, ul. Piastowska 13m54, Pollando.

31-jara oficisto interesiĝas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas postmarkojn. Adreso: Arkadiusz Kowalski 26-110 SKARŻYSKO-KAM, ul. Słowackiego 33/16, Pollando.

18-jara lernanto de teknikumo, alta 180 centimetrojn interesiĝas pri eksterlanda turismo, moderna muziko, fotografado, estas adepto de nudista plago. Adreso: Marcin Majchnak, 62-005 OWINSKA, ul. Polna 12, Pollando.

29-jara laboristo, malalta 160 centimetrojn, interesigas pri eksterlanda turismo, moderna muziko, baleto, fotografado, estas adepto de nudista plaĝo. Adreso: Gregon Wiśń, 62-005 OWIŃSKA, ul. Dworcowa 5/9, Pollando.

En la pasinta jaro ni komencis lerni la Internacian Lingvon en studenta klubo REMEDIUM en Vroclavo. En la klubo aliĝas personoj kun malsanoj de movorganoj kaj iliaj prizorgantoj. Nia grupo konsistas el personoj, inter kiuj parto movigas helpe de invalidveturiloj. Ni estas la unua grupo en nia medio, kiu ekdecidis pere de Esperanto ligi pli vastajn, amikajn kontaktojn kun homoj troviĝantaj en simila situacio. Ni serĉas gekorespondantojn en Ĉeĥoslovakio kaj kalkulas je la reciproka fruktodona kunlaboro en solvado de niaj lingvaj kaj viv-problemoj. Ni esperas, ke Vi persone volus korespondi kun ni. Ni atendas baldaŭan respondon kaj rapidan kunligon de amikaj rilatoj. Kun amikaj bondeziroj: Barbara Barańska, Iwona Kiol, Andrzej Kjażewski, Wacław Wisniewski, Andrzej Suchożewski, Andrzej Kostka. Adreso por korespondi: Andrzej Suchożewski, ul. Roentgena 10/2, 50-362 WROCLAW, Pollando.

23-jara fraŭlo, konstruisto, interesigas pri turismo, naturo, folkloro, skioj. Li tre satas montojn, volus interŝanĝi turismajn bildkartojn. Adreso: Andrzej Szczerbowski, 43-323 CZECHOWICE-DZIEDZICE ul. Gornicza 34 a m. 9, Pollando.

Leo Teder, Nõmme sovhoos, SU-203622 KILLINGI-Nõmme, Estonio, USSR serĉas korespondamikojn por diversforma korespondo kaj vigla interŝanĝo de poŝmarkoj, bildkartoj aŭ kalendaretoj. Respondo garantiita.

18-jara studentino de geografio en Vilnius-a universitato deziras korespondi kun tiuj, kiuj ŝtas geografion, naturon, vojaĝojn. Ŝi skribas Esperante, ruse, germane. Adreso: SU-232049, Litovio, VILNIUS, Architektų 65-49, Dovylių Krupickaitė.

21-jara hungara knabino volas korespondi kun iu ajn en Ĉeĥio. Mariana Huszak, BUDAPEST, Szilke u. 8. V. em. 15, 1039, Hungario.

18-jara hungara knabo volus korespondi kun knabinoj 14-18-jaraj: Kovács József, HATVAN, Béke út 52., 3000, Hungario.

Pedagogia sekcio de ĈEA anoncas

Dum la tagoj 19-24.04.1988 okazos la internacia Pedagogia seminario en la urbo S t r á ž n i c e, distr. Hodonín. Detalojn, aliĝilojn ktp. ĉe s-ano d-ro Vladimír Škoda, Sovětská 919, CS-685 01 BUČOVICE, distr. Vyškov.

Konstanta plialtigo de la nivelo de konoj estas devo de ĉiu esperantisto kaj nepra antaŭkondiĉo por plua diavastigado de la Internacia Lingvo. Tiucelen servas la biblioteko de la Scienca-teĥnika sekcio de ĈEA. Nun, laŭ decido de la estraro de ĈEA, la biblioteko povas plibonigi siajn servojn. La estraro de ĈEA decidis transpreni la kostojn ligitaĵojn kun la elpruntado de publikaĵoj. Sekve, venonte forfalas la prunt-kotizo kaj la sendkostoj dum la elpruntado. La interesiganto /elpruntanto/ pagos nur registritan resendon de la libro. La bibliotekon gvidas Marie Bartovská, sch. Místek 67, 738 02 Frýdek-Místek.

Somera Esperanto-Tendaro en Lančov

okazos ĉi-jare en tri etapoj:

1. de la 3-a ĝis la 16-a de julio 1988,
2. de la 17-a ĝis la 30-a de julio,
3. de la 31-a de julio ĝis la 13-a de aŭgusto 1988. Adreso: Esperanto-klubo, 674 01 TŘEBÍČ.

Jste-li ochotni vyučovat na Lančově, ať už v roce 1988 nebo v budoucnu, přihlaste se nejpozději v březnu 1988 na adresu: Jan Sebel, Okrajová 1156, 674 01 Třebíč. Ty, kteří budou ve funkci hlavního učitele, prosíme o vypracování stručné zprávy o výuce na etapě a odeslání do konce srpna na adresu: V.K. Barandovská, Volgogradská 41, 704 00 Ostrava 3. - Hledáme manželskou dvojici, nejlepší duchodce, pro místo správce chatové osady a uklízečky pro Chatovou osadu Klubu esperantistů, ZO ČES Třebíč, která se nachází v Lančovské zátoce na Vranovské přehradě po dobu od 2.5. do 30.9.88. Ubytování v chatě. V době hlavních prázdnin možnost stravování. Podmínky: znalost esperanta - aspoň částečná, být mobilní,

vést jednoduché účetnictví. Plátové podmínky dle platných směrnic budou dohodnuty přímo s provozovatelem Klubem esperantistů, základní organizace Českého esperantského svazu, 674 01 Třebíč.

Pište na adresu: Esperanto, 674 01 Třebíč.

Junulara renkontiĝo en Prago

La 12-14-an de junio 1987 okazigis Junularo de la praga E-klubo internacian renkontiĝon de gejunuloj en Prago, en la tendaro Motol. Eksterlandanoj kaj pliaj interesigantoj alveturis jam jaŭdon posttagmeze, ĉar la venontan tagon estis planita por ili trarigardo de la urbo. Sabate ĉiuj ekskursis en la ĉirkaŭaĵo de Prago (de Karlštejn/burgo de la imperiestro Karlo IV./ trans Koněpruské jeskyně /famaj grotoj/ al la urbo Beroun). Ĉiuvespere estis libera amuzado (kantado, bivak-fajro).

La arangon sub la titolo JuSeTuR partoprenis ĉirkaŭ 30 esperantistoj (inkluzive gastojn el GDR kaj Hungario), kiuj dimanĉon eldiris sian adiaŭon: "Venontjare ĝis la revido!"

Inter la 19-a kaj 22-a de majo 1988 okazos en Prago, en la tendaro de junpioniroj en Hostivař 2-a JuSeTuR (Junulara semajnfina turisma renkontiĝo) al kiu ni ĉiujn kore invitas. Oni atendu similan programon kiel pasintjare. Interesigantoj, por ricevi pli detalajn informojn, povos skribi al jena adreso: Jindřich Havlík, Plechanovova 363, CS-109 00 Praha 10.

Scienc-teĥnika sekcio de SEA invitas vin al la konferenco AEST pri RACIIGO EN SCIENCO KAJ TEKNIKO de la 3-a ĝis la 5-a de aŭgusto 1988 en Uzina klubo de Vagonka POFRAD. Celo de la konferenco: Interŝanĝo de spertoj inter fakuloj, personaj rilatoj. Temoj: 1. Komputiloj - ilo de raciigo. 2. Raciigo de scienc-teĥnikaj laboroj. 3. Prognozistiko. 4. Terminologio.

La manuskriptojn de akceptitaj prelegoj necesas sendi ĝis la fino de aprilo 1988. La limdato por aliĝiloj de partoprenantoj - neprelegantoj estas 15.6.1988. La partoprenkotizo 150,- Kčs inkluzivas organizaĵajn elspezojn, prelegkolekton kaj

komunan vesperon. La aŭtoroj de akceptitaj prelegoj havas 30%-an rabaton. Mangado por 3 tagoj kostas 150,- Kčs. Tranokto (1 nokto) kostas: turisma: 60,- Kčs (enlandanoj 35,-Kčs) hotela: 170,- Kčs (enlandanoj 60,-Kčs) Enlandanoj pagos per la poŝtagilo, kinun ricevos ĉiu aliĝinto. Eksterlandanoj pagos surloke.

Post la konferenco okazos en Žilina tradiciaj Turismaj Tagoj (TUTA'88) en la tagoj 6.8. - 12.8.1988. Korespondadreso: Ing. Juraj BRITKA Velká okružná 28. CS-010 01 ŽILINA.

Renkontiĝo por interlingvistoj kaj esperantologoj

La sekva 16a Scienca Interlingvistika Simpozio okazos en Varsovio inter la 27.04. - 01.05.1988 j. sub aŭspicio de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo de UEA. La arango farigis jam tradicia preleg-kaj diskutforumo, kiu kunvenigas fakulojn kaj aliajn Esperanto-movadanojn interŝanĝi pri diversaj aspektoj de internacia lingva komunikado. La simpozio estos dediĉita al la temo:

- LINGVO-KOMUNIKADO KAJ LINGVO-PLANADO. La ĉeftemon la organizanto - Akademia Centro Interlingvistika - proponas pri diskuti laŭ jenaj subtemoj:
- 1/ Kultura kaj sociopolitika aspektoj de la lingvo-planado
 - 2/ Sociologio de internacia planlingva parolkomunumo
 - 3/ Specifeco de Esperanto rezultanta el ties planiteco
 - 4/ Strategiaj demandoj de interlingvistiko.

Interesiguloj povas ricevi detalajn informojn de : Akademia Centro Interlingvistika, Ordynacka 9, 00-950 Varsovio, Pollando.

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Esperantologoj, interlingvistoj kaj aliaj fakuloj interesitaj pri interlingvistika problemaro povas ricevi "Informilon por Interlingvistoj" eldonatan de Akademia Centro Interlingvistika kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. Fakuloj skribu al Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Okaze de la Jubileo eldonis ĈEA memorigan medalon. La artan proponon faris konata ĉeĥa skulptisto-esperantisto Jiří Hancuba, kiu i.a. proponis jam kelkajn ĉeĥoslovakajn monerojn.

Sur la frunta flanko estas parto de portreto de la Majstro kunligita kun la E-stelo. Dorse estas simbolo de la Jubilea jaro kaj teksto. La medalo el bronzo havas diametron 60 mm kaj ĝin stampis la kooperativo de artproduktado Znak en Malá Skála. La alta artnivelo de la medalo vekis atenton ĉe fakuloj kaj pri ĝi jam interesiĝis diversaj muzeoj kaj ankaŭ numismatikistoj.

La eksterordinara memoraĵo pri la Centjarigo de Esperanto estas nemalhavebla por ĉiu esperantisto. Ĝi estas aceteblo en la sekretario de la asocio por 130,- Kčs, respektive por 140,- Kčs kun aparta ujo.

vlko

La sekcio de esperantistoj-invalidoj de ĈEA

planis varbi novajn membrojn por ke la sekcio havu ĝis la fino de la jaro 1987 entute 200 membrojn, en la jaro 1988 250 membrojn kaj laŭ la perspektiva plano oni volas akiri por Esperanto 1 % el membroj de la neesperantista Asocio de invalidoj, t.e. 2000 membrojn de la E-sekcio.

Pri la laboro de la sekcio kaj pri la E-movado oni publikigis artikolojn en la gazeto de Asocio de invalidoj "Elán" kaj en la tutŝtataj kaj regionaj ĵurnaloj kaj ankaŭ en la ĉeĥoslovaka radio.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafika aranĝo), Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas OKP-6 Liberec. Transdonita al presejo 1987-12-30. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 MLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafická úprava), Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Předáno do tisku 30. 12. 1987. Dohledací pošta Praha 07. Sniženy poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

TE/19861228

KONTRIBUO AL CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO

Depost la eldono de la unua lernolibro "Internacia lingvo" en la rusa lingvo "Международный язык" restis al la lingvo la nomo "Esperanto" eĉ se temas pri pseudonimo de d-ro Zamenhof. Kaj tiu nomo restis, eĉ se ĝi retenis ankaŭ sian originan sencon. Tial validas la frazo: Esperante, ke vi respondos al mi Esperante... kiu komence saĝnas nekomprenebla.

Esperanto disvastiĝis al sia nuna stato dank' al fervora kaj oferema entuziasmo de unuaj Esperantistoj, eĉ se kelkaj estis nekontentaj kaj strebis reformi aŭ korekti Esperanton kaj elpensis eĉ aliajn projektojn. Tamen neniuj sukcesis tiom kiom Esperanto kaj ĉiu nova projekto malproksimiĝis de la idealo pri simpleco kaj facileco. Sed certe plej grava sukceso de Esperanto estas, se aperas multa literaturo, ne nur lernolibroj, sed ankaŭ libroj, kiuj instruas per Esperanto pri aliaj fakoj kaj temoj. Tial estas gravaj multaj turismaj prospektoj, broŝuroj politikaj, sciencaj kaj amuzaj. Kaj plej granda sukceso estas, se Esperanton uzas neesperantista organizo.

Tial estas por Esperanto grave, se ĝi estis uzita en veturhoroj de kelkaj fervojoj, kiel ĉeĥoslovaka, hungara, en broŝuroj kaj libroj de neesperantistaj eldonejoj.

The Gospel in Many Tongues: Esperanto en multaj langoj. British and Foreign Bible Society, 146 Queen Victoria street, London E.C. eldonis en 1927 libron, en kiu estas verso el la teksto de la bibliio, ĉar en tiun lingvon estis la biblio tradukita kaj ofte farigis komenco de la literaturo de koncerna lingvo. En la libro estas ekzemploj de 590 lingvoj ne nur per latinaj literoj, sed eĉ per aliaj. Jen ekzemploj:

30 Basque French: Labourdin Dial. Pyrenees S.France

Alabainan Jainkoak haletan du mundua maithatu, non bere Seme bekharra eman baitu, hunen baithan sinhestén duen nihor ez dadien gal, aitzitik izan dezan bethiko bizitzea 1887

133 Esperanto: International

Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas je li, ne pereu, sed havu eternan vivon 1913

Eldonejo "Liesma" en Riga, Sovetia Latvio, eldonis en 1966 poemon de Jánis Rainis: Lauztās priedes. Tiu ĉi kvarstrofa poemo estas en 48 lingvoj, inter ili: Esperanto valodā, atdzejojusi Milda Jakubcovā "Rompitaj pinarboj".

En 1971 eldonis la Centroĉeĥa eldonejo al la kvindekjara jubileo de Komunista partio tekston de la kanto "Internacio" en 31 lingvoj. La nua lingvo estas Esperanto. Interese estas, ke ekzistas eĉ aliaj tradukoj en Esperanto de tiu kanto. La aŭtoro de tiu traduko ne estas nomita

Jósef Chvosta

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

**Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**